

Sennacieca Revuo



La lingvo internacia devas vivi, kreski kaj progresi laŭ la samaj leĝoj, laŭ kiaj estis ellaborataj ĉiuj vivaj lingvoj.
L. L. ZAMENHOF

Oficiala Organo
de
Sennacieca Asocio
Tutmonda

Jarabono: principe, valoro de kvarhora laborsalajro (vidi la ciferojn por ĉiu lando en la Oficiala Informilo de S. A. T.)
La abonoj komenciĝas nur en Januaro aŭ en Julio

REDAKCIO: **E. LANTY**

24, Boulevard Beaumarchais — PARIS XI (Francio)

ADMINISTRACIO: **L. GLODEAU**

177, Rue de Bagnolet — PARIS XX (Francio)

... Vivantigi Esperanton

En la priesperanta raporto akceptita de la *Ligo de Nacioj* oni povas legi pri milionoj da lernolibroj jam disvenditaj en la mondo.

Nu, ni komparu la nombron de veraj praktikantoj de esp.o kun tu de lernolibroaĉetintoj.

Nur abonantoj de esperante redaktataj gazetoj indas esti konsiderataj kiel praktikantoj de la lingvo. Sciante ke la plej legataj eliras apenaŭ dekmilekzemplere, oni tuj povas ekvidi kiom signifa estas la rezultajo de la ĝisnuna esp. propagando.

Kiel klarigi tiun bedaŭrindan konstaton?

Multaj personoj lernis esp.on nur pro modo, pro ia dandismo. Neniam ili konsciis pri la graveco de la mondlingva afero. Forpasis la modo, aŭ pro iela kaŭzo ili plu ne okupiĝis pri esp.o.

La plejmulto el la aĉetintoj de lernolibroj ne ĝisfunde lernis la lingvon. — "Ĝi estas tiel facile lernebla!" diras la troigemuloj — kaj pro tio ne trovas ian ĝuon en legado de esp. tekstoj. Tiuj baldaŭ ĉesis interesiĝi pri nia afero.

Internaciistoj lernis esp.on, ĉar ili opiniis, ke internacia lingvo estas internaciigilo. Sed ne trovante okazon apliki praktike sian scion, ili ankaŭ forlasis nian movadon.

La ridinda, fireligiĉa spirito, kiu antaŭmilite ĉiam prezidis en esp. demonstradoj, forpelis kelkajn revoluciulojn kiuj ne volis partopreni en movado aspektanta kiel kvazaŭa "Salvarmeo".

Aliaj kaŭzoj ekzistas, kiuj ankaŭ povus respondi al la ĉi-supre starigita demando.

Kiaj ajn estas la kialoj, kiuj malhelpis la enfaktigon de esp.o en la vivo, oni ne povas malatenti la fakton, ke,

malgraŭ disvendado de milionoj da lernolibroj, la nombro de veraj praktikantoj de esp.o estas ankoraŭ tre malgranda.

Tamen, nur praktikantoj de lingvo igas ĝin vivanta: Latinon ĉiutage kaj devige lernas milionoj da studentoj en la tuta mondo. Spite tio latino restas nur mortinta lingvo, tial ke ĝi ne estas uzata en la praktiko.

Ni do unue devas plene konscii pri la nepra neceseco de ofta uzado de esp.o, por eliri, almenaŭ spirite, el la kadro de nia nacio, — cele al tutmonda kulturo. Ni devas ĝisfunde lernadi nian lingvon por ĝui ĝian spiriton kaj ĝin vivantigi per novaj esprimmanieroj.

Uzi esp.on ne farante gramatikajn erarojn estas nur akcesoraĵo. Kio gravas, estas encerbigi, enmensigi la geniecon de la racia esprimilo, kiun kreis Zamenhof.

Kaj precipe ĉiuj S. A. T.-anoj devas lerte penadi por ke nia organizaĵo ebligu al ĉiuj materialan utiligadon de esp.o.

La ĝisnuna preskaŭ nur porvarba propagando similis la mitologian barelon de la Danaŭsidinoj. Oni varbis, varbadis, sed la varbitoj nur transpasis la senfandan esp.an movadon.

Mi esperas, ke fine ĉiuj seriozuloj atentis pri la faktoj; komprenos, ke nia movado estos solida nur kiam la aĉetintoj de gramatikoj ne forlasis esp.on post kelka tempo, sed enviciĝos en S. A. T. por utiligi sian lernan akiraĵon.

Al ĉiuj varbitoj ni komprenigu, ke ni kuntrenas naciecan heredaĵon, kiun ni devas forĵeti per kiel eble plej ofta uzado de sennacieca lingvo kun ĉiulandaj samcelanoj. Esp.o estu en niaj manoj trafa edukilo, kiu igos nin indaj mondĉivitanoj.

Tiele esp.o fariĝos vere vivanta lingvo, kiu kreas mondkulturon, sennaciecan spiriton, — kaj helpas al la ruinigo de la landlimoj; al la forigo de la haladza patriotismo mortiga.

E. Lanty.

Konservativismo kaj radikalismo

Ekzistas — grande rigardate — du diferencaj specoj da homoj en la mondo: Unuflanke ti-kiuj havas la povon kaj la volon fari progreson, kaj aliflanke ti-kiuj estas kontentaj kun la aferoj kaj la cirkonstancoj tiaj kiaj ili estas. Tiuj diferencaj specoj da homoj ekzistas jam de tiu tempo, kiam la homoj vivis en la arbaroj kiel simioj aŭ duon-simioj. La granda amaso da homoj ĉiam estis kontenta kun la aferoj. Ili ne povas fari inventojn kaj ne havas novajn ideojn. — En tiu tempo kiam la homoj vivis kiel bestoj en la arbaroj la granda amaso estis kontenta kun la vivo kaj ne kredis ke povus esti aliel; samkiel en nia tempo la granda amaso estas kontenta kaj ne kredas ke nur povus esti aliel. — La alia parto da homoj, la malgranda parto, havas ne nur la povon kaj la volon fari progreson, sed estas en ili nekontraŭstarebla bezono por trovi la leĝojn de la natura kaj socia vivo. Ili peninventas kaj organizas, kaj tial tiuj levigas la homojn super la bestojn.

Oni povus kredi ke tiu lasta speco da homoj estas alte estimata en la societo. Kontraŭe, la tuta historio montras ke tiuj homoj ĉiam estas konsiderataj kiel malamikoj de la homaro, kiel frenezuloj, kiel krimuloj, kaj ili estas mokataj kaj persekutataj kaj tre ofte mortigataj. Ili kutime estas konsiderataj kiel la elsenditoj de la diablo. Oni povas certe supozi ke la unua kiu eltrovis fari fiŝhokon el osto aŭ ligno por kapti fiŝojn, anstataŭ preni ilin per la manoj, estis mokata kaj ridindigata. Tra la tuta historio ni legas la samon, kvankam la historio nur montras kelkajn nemultajn aferojn. Ni nur memoru la sorton de preskaŭ ĉiuj elpensintoj, preskaŭ ĉiuj mortis en malriĉeco kaj mizero. — En la spirita kaj intelekta kampo estas multe pli malbone. Novaj ideoj ĉiam same efikis je la amaso kiel ruĝa ĉifono je bovo. La batalantoj por novaj ideoj (idealistoj) ĉiam estis persekutataj: Sokrato, Jesuo Kristo, la unuaj kristanoj, Johan Huss, kaj en la pli nova tempo: Dr. Zamenhof, Krapotkin, Dr. Liebknecht, Rosa Luxemburg, Eugen Debs kaj multaj aliaj.

Ĉiuj tiuj martiroj puŝis la homaron antaŭen. Ni povas diri ke tiu speco da homoj kreis la homaron. Ĉar, se ni ne havus tiun specon da homoj, se de la komenco ĝis nun nur estus konservativuloj, la homaro ne ekzistus. Ni estus bestoj.

Homoj kun novaj ideoj ĉiam estas mokegataj kaj persekutataj de sia samtempularo. La ideoj regule nur estas akceptotaj de la sekvantaj generacioj, kaj tiam ofte en falsigata formo.

En malnovaj tempoj estis same kaj kun materiaj inventoj kaj kun spiritaj ideoj. En nia tempo, oni ne plu mokas novajn aferojn en la materia kampo. Oni tie vidas la faktojn, ke inventoj estas por la bono de la homaro. En la materia kampo la prudento fine venkis la antaŭjuĝojn kaj la stultecon. Sed en la spirita kampo estas ankoraŭ tre malhela. Novaj ideoj estas ankoraŭ mokegataj kaj persekutataj, preskaŭ same kiel antaŭ milo da jaroj. Oni devas demandi, kiam venos do la tempo kiam spiritaj ideoj estos tiel same liberaj kiel ideoj en la materia kampo?

Ni ankaŭ vidas ke ĉiam estis batalo inter tiuj du fortoj kiuj estas reprezentataj de tiuj du specoj da homoj, kaj nun pli ol iam la batalo estas akra. Batalo inter mensogo kaj vero, inter stulteco kaj prudento, inter dogmoj, antaŭjuĝoj kaj la libera, sana penso: inter malhelo kaj helo. Ni vidas tiun batalon en ĉiuj kampoj. — Povu ni je ĉiu fronto meti nin al la ĝusta flanko, al la flanko de reala vero, reala justeco, reala prudento, reala klareco, reala libereco.

Ibsen diris kontraŭ la paradokso pri la praveco de la plimulto ke "tiuj estas pravaj kiuj estas en asocio kun la futuro"¹⁾. Tio estas vera, ĉar tion certigas la tuta historio. — Ni ankaŭ estas pravaj rilate al nia lingvo esp.o, ĉar ni estas en asocio kun la futuro, kaj nia ideo estas bazita sur la historia evoluo. Sed *sole* ne sufiĉas por krei harmonian kaj feliĉan mondon. Esp.o estos preskaŭ senutila, se ni ne samtempe aliformigos la cirkonstancojn. Antaŭ ol semi ni devas prepari la grundon, kaj nun ni devas nur semi tie, kie la grundo estas tiel preparita ke povos kreski la bona semo. Kiel la cirkonstancoj nun estas, kaj kiel la esp.istoj nun laboras, la semo falas plejofte sur ŝtona grundo. — Pro tio, la veraj esp.istoj, devas partopreni en la batalo je *ĉiu fronto* por klareco, por ke ni povu aliformigi la socion, tiel kiel nia lingvo estos uzata por la bono de la homaro. Tiel kiel nun estas, ni riskas, ke esp.o estos uzata en la servo de la reakcio, en la servo de la malklarecigo, samkiel ni jam vidis, ke estis farita kun aliaj grandaj ideoj, kaj kiel ni jam vidas rilate al nia lingva ideo.

La malamikoj de la homaro ne estas precipe la indiferentuloj, sed ti-kiuj falsigas la grandajn ideojn, aliformigas ilin aŭ uzas ilin en la servo de la malbono. La mondo ĉiam estis plena de delogantoj de la homaro; tiuj estas la plej granda baro kontraŭ la liberigo de la homaro, la plej granda baro kontraŭ la kreado de harmonia kaj feliĉa mondo. Tiuj ĉi hipokrituloj kaj delogantoj estas niaj malamikoj, kaj kontraŭ ili ni iru en militon por la fina liberigo de la homaro!

Arne Sather.

La Brita Senlaborularo

La oficiala senlaborula movado ĉi-tie komenciĝis aŭtunon 1920. Kelkaj el la plej progresemaj (preskaŭ ĉiuj inĝenieroj) de la ne-dungita amaso unue starigis du komitatojn en Londono. Nuntempe estas proksimume 360 komitatoj en Anglio, Kimrio kaj Skotlando, kunligitaj kun la *Centra Nacia Komitato*. Ĝis nun 2 Naciaj Kongresoj okazis, la unua aprilo 1920, la dua en novembro samjare.

La organizo de la Asocio estas jena: krom la *Nacia Administranta Komitato*, estrata de Prezidanto, Organizanto kaj Kasist-Sekretario, estas 7 Provincaj Regionaj Konsilantaroj, konsistantaj el la delegitoj de ĉiuj komitatoj. Tiuj regionoj havas similajn oficistojn kiel la Centra Komitato, kaj ili kunsidas en Londono tiel ofte kiel eble. Ili havas

(1) Estonteco. — Red.

la devon zorgi kaj plimultigi la diversajn komitatojn en siaj propraj regionoj. Plue, kie estas grandaj urboj kun diversaj registaraj Labor-borsoj kaj komitatoj de t. n. Zorgantoj pri Malriĉuloj, estas fondata *Loka Konsilantaro*, por ke la tuta komitataro agu amase se necese.

La Komitatoj pagas 2 Ŝilingojn por aliĝi kaj la anoj po 2 pencoj komence. Ili ricevas karton por markoj kaj poste pagas po 1 penço semajne. Oni dividas la enspezitan monon inter la Lokaj, Fakaj kaj Naciaj korporacioj.

Du ĉefaj celoj vidiĝas en ĉi-tiu movado: unue, la oficistoj senĉese trudas sin al Registaraj oficistoj por postuli pagon egalan al tiu, kiun ricevas laborantoj: due, ili agas kiel eble plej por helpi siajn fratojn dungitajn ke iliaj salajroj ne malpligrandiĝu, nek horoj estu aldonataj; kaj ili ĉiam laboras por konstrui ponton inter la senlaboruloj kaj la dungitoj. Vere, ĉi-tiuj Senlaboruloj estas plej revoluciaj kaj plej sindonemaj el la tuta laboristaro ĉi-tiea, kaj ĝis nun ili ne ricevis sufiĉe da dankoj nek da atento de la plibonŝanculoj. La oficiala *Laborista Partio* nevolonte kaj malvarme aŭskultas ilin, montrante la veran burĝan spiriton, juĝante ĉiun kompatindulon kvazaŭ krimulon. Ĉiam, kiam okazas striko, la Senlaboruloj publike sciigas sian intencon rifuzi anstataŭi la strikantojn; plue, ili kelkfoje atakas fabrikejojn, ktp. kie oni devigas la laboristaron labori ekster la ordinaraĵoj, samkiel ili atakas iafoje la Komitatojn de Zorgantoj de Malriĉuloj.

Kompreneble, ĉi-tiu movado ne ĉiam havas egalan vojon, ĉar kelkfoje en iuj lokoj oni subite dungas grandan aron da laboristoj por ia entrepreno. Ankaŭ kelkfoje venas plendo de iu Sekretario, ke post kiam liaj klopodoj efektivigis pligrandigon de registara pago, la pagatoj forgesas subteni sian propran komitaton; aŭ eble, iuj elektitaj oficistoj ne bone agas por la movado, eĉ kelkfoje malaperas kun kesto da mono (sed tre malofte tio okazas).

La gazeto de la movado "Out of Work" (Senlaboro) aperas dufoje monate: la nombro da ekzempleroj eldonataj ŝanĝiĝas de tempo al tempo, sed la mezkvanto estas ŝajne 20000; sed la nombro da senlaboruloj laŭ la lasttempa anonco de la Registaro (kiu kompreneble ne estas interresata pligrandiĝi) estas preskaŭ 1400000. Do, la eldona kvanto devus esti pli granda.

La oficistoj de la Nacia Komitato laboras senĉese por zorgi kaj helpi siajn kunkompatindulojn. La Sekretario malofte iras hejmen nokte, sed kuŝas senkomforte en la oficejo, ĉar lia loĝejo estas malproksima. Li estas manlaboristo, sed instruis al si la diversajn sekretariajn kaj librotenedajn aferojn: li estas mirinde bonanima kaj ĉiam povas trovi tempon por ŝerco aŭ simpatio. Li kaj aliaj kelkfoje klopodas la tutan nokton, se estas speciala laboro necesa.

Okazis ĝis nun kelkaj organizitaj marŝadoj de la Senlaboruloj, kaj en ĉi-tiu momento (Oktobro) ili estas kometintaj grandan nacian marŝadon el provincoj al Londono por sin prezenti al Ĉefministro por eltiri de li promeson por plibonigo de vivrimedo. Iuj venas el malproksima Skotlando; ili jam komencis sian vojiron por kuniĝi kun la aliaj pli malfrue.

* * *

Nun mi turnas min kun praktika propono al la S.A.T.-anoj. Mi kelkfoje parolas pri esp.o al tiuj oficistoj pri kiuj mi supre skribis kaj trovas ilin esperantemaj, sed ĝis nun mi ne sukcesis instigi ilin lerni la lingvon. Mi pruntedonis lernolibron al Wal Hannington, la Organizanto, sed li ankoraŭ ne komencis lerni. Mi volonte estus stariginta *komencan* kurson en la oficejo, sed mi bone scias, ke mi ne povas certigi ke la lernantoj ĉeestus regule, ĉar ilia movado, kompreneble, ofte necesas subitan agon aŭ longedaŭran laboron. Do, estas nur eble, ke ili lernu solaj. Eble iun tagon ili sin trovos en malliberejo, kaj tie ili povos trovi la esp.o-lernolibrojn, kiujn mi kaj aliaj sendis tien, ankaŭ la necesan tempon por studado. Dume, por stimuli la emon al la lingvo, sendube troveblan en ili, mi konsilas, ke ĉiu kamarado kiu povas doni informon pri senlaborula movado en sia propra lando, skribu pri tio en esp.o al *Percy Hays*, Sekretario N.U.W.C.M., 3 Queen Square, Londono, W.C. 1. Mi kredas, ke li mem lernos la lingvon post ricevo de kelke da tiaj leteroj, kvankam mi unue tradukos ilin, ĉar li multe interesiĝas pri movadoj similaj al la sia en aliaj landoj. Li jam ricevis gazetojn de la Usonaj kaj Aŭstraliaj senlaboruloj.

Do, kamaradoj en kies landoj estas senlaboreco, provu ĉi-tiun proponon; mi estas konvinkita ke la rezulto estos bona.

Londona Satanino.

Du gravaj fakkongresoj en Svedio

Tiun ĉi aŭtunon la Tutsveda faka centra federacio (landorganisationen) kaj la plej granda Sveda fakasocio, la asocio de metallaboristoj, kongresis.

La ambaŭ kongresoj spegulas la bataladon inter la reformista kaj la revoluciema opinio rilate al la organizaj formoj, taktiko, kaj programo de la laboristaj fakasocioj. Ĉar la decidoj de tiuj kongresoj havas grandan signifon por la plej grandaj grupoj de svedaj laboristoj ni volas diri ion pri la plej gravaj decidoj.

La centra asocio (aliĝanta al Amsterdam) jam antaŭ multaj jaroj diskutis la demandon pri "fak- aŭ industri-asocioj". Ankaŭ ĉe la lasta kongreso tiu demando estis ĉefdemando. Jam en la jaro 1912 la asocio decidis ŝanĝon de fakasocioj al industriasocioj. Tamen la laboristaj gvidantoj de tiu kongreso venkis kun sia propono ke la ŝanĝiĝo devis okazi malrapide. Ĉar la penso pri industriasocio plejmulte estas aplikata de la pli radikalaj laboristoj kaj kiam ili ne havis influon en la estraro de la asocio oni kompreneble nenion faris por praktike realigi la decidon de 1912.

La bezono de komuna laborista batalo kaj la sperto ke la malnova taktiko ne estas efektiva devigis la nunan kongreson fari novan firman decidon. Tamen la reformista gvidantaro de la asocio tre akre kontraŭbatalis la proponon kaj oni decidis, ke ĝis 1925 tute devas ŝanĝiĝi en industri-asociojn.

La decido signifas ke 14 fakasocioj devas malaperi kaj ĝiaj membroj devas eniri la industriasociojn. Kompreneble

kelkajn malfacilaĵojn renkontas ni en la komenco, sed sciante ke tia ŝanĝo ebligas pli sukcesan batalon kontraŭ la kapitalistoj ni certe venkos ĉiun malhelpon. Estas ne nur en la salajrobataloj ke ni venkas per la industria formo, sed ankaŭ en pli disvastiga batalo ni venkos multe. En Svedio kiel en aliaj landoj la laboristoj devas elekti aŭ longdaŭran suferon sub la kapitalista sistemo aŭ novan fortan batalon por forigi la kapitalistan sistemon. Starante antaŭ tiu fakto estas tute klare, ke la faka movado devas havi kiel ĉeftaskon konstrui socialistan, produktan kaj socian sistemon. Ĉiuj decidoj kaj faroj devas esti preparado de la vojo al tia sociŝanĝiga agado.

Plejparto el la fakaj asocioj en Svedio estas ankoraŭ kolektive aniĝintaj al la socialdemokrata partio. Multaj membroj dum longa tempo riproĉis tian aniĝon. Pro la divido de la laboristoj en tiuj multaj grupoj politikaj estas granda bezono forigi la kolektivitan sistemon. Je la ambaŭ kongresoj oni ankaŭ proponis forigon de la kolektivismo. La soc. dem. elementoj, kiuj opinias ke ilia partio devas havi monopolon je la fakasocioj estis tamen la plejmulto kaj ili savis la malnovan formon. La evoluado tamen iom post iom lernigis la laboristojn kompreni ke ili en la ekonomia fronto povas batali pli efike, se iliaj fakasocioj estas sendependaj de la politikaj partioj. La fakasocia movado estas jam nun tre signifa por la plejparto de la laboristoj kaj ĝi devas esti la plej signifa faktoro en la klasbatalo. Tial ni devas postuli ĝian sendependecon politikan kaj krom tio ke ĝi akceptas klaran revolucionan programon.

La metallaborista asocio kiu jam ĉe la kongreso 1919a en sia Statuto montris sian socialistan karakteron, diskutis la demandon, kaj la lasta kongreso eldiris sian opinion, ke la fakasocioj devas labori por efektiviĝi socialismon.

Transsendita de
"Svedā Laborista Esperanto Asocio".

S. A. T.^a Monkolekto por la Rusaj malsatuloj

13^a listo de monoferantoj

K.do Leakay (Greybole, Anglio) 41,60 fr. fr., K.do E. Lanty (Paris) 20 fr. fr., Kino M. Planchon (Sucy, Francio) 20 fr. fr., Fratoj Landsberg (Lodz, Polio) 500 mk. pol., La proletariaj esp. de Praga-Varsovio 1000 mk. pol., parto el la saldo de la kongreskaso (Frankfurt) 1500 mk. g.

Kun la 7a ĝis 12a listo = 808,80 fr. fr., 5 fr. belg. 57 kr. ĉek., 3578,25 mk. g., 2650 mk. pol.

La de la 6 antaŭaj listoj produkto (450,80 fr. fr., 314 mk. g., 350 mk. pol., 9 kr. ĉek.) estis uzata por pagi la unuan ekspedon de nutraĵoj al Rusio (legi la majan N.on).

Municio por Sennacieca Revuo

(Ricevita dum Septembro-Oktobro)

Argentino: A. Barrot 32,50 fr.; Francio: Raguier 1 fr., Marthe Planchon 7 fr., Masseti, G. 2,50 fr., J. Estour 10 fr., R. Ley 0,50 fr., M. P. (Genève) 2 fr., J. Habert 10 fr., Glodeau 5 fr.; U. S. A.: George Saville 42 fr.; Aŭstrio: R. A. Čech 2700 kr. aŭst., M. Tenner 500 kr. aŭst., K. Kozina 1500 kr. aŭst., M. Ultmann 500 kr. aŭst., Kōchling 700 kr. aŭst.; Estonio: Tamberg 220 mk. g.; Germanio: Dresden 3a listo 110 mk. g.; Polio: Landsberg 500 mk. p., Rotowna 200 mk. p.

Sume: 112,50 fr. fr., 5900 kr. aŭst., 340 mk. g., 700 mk. pol.

Tri semajnojn en Rusio¹⁾


(Daŭrigo)

Ĉe la sidejo de "Komintern"

— Kiom da tempo vi intencas resti ĉi-tie? demandis min k.do Doriot, la sekretario de *Internacia Junularo Komunista*, Franco, kiun mi havis okazon renkonti ĉe la hotelo "Lux".

— Proksimume tri semajnojn.

— Nu, vi prudente agos ne prokrastante pri viaj klopodoj. Oni ne kutimas rapidi ĉi-tie. Plie, neniam oni scias, kiam oni povos forveturi...



Granda Kremla Palaco. Vidaĵo de la Ŝtona ponto.

Mi do decidis tuj iri al la sidejo de *Komintern*. Doriot indikis al mi la vojon, faris desegnon sur paperpeco, kaj, provizumite de tiu plano, mi iris.

Sen tro granda peno mi trafis la lokon. Sur placo, ne malproksime de l'Kremlo, staras granda konstruaĵo sur kies fasado oni povas legi kvarlingve la faman frazon: "Ĉiulandaj proletarioj unuiĝu".

Mi aliris ĉe la enirejo. Tie du deĵorantaj soldatoj malpermesis, ke mi eniru. Unu diris kelke da vortoj de mi nekompreneblaj kaj gestis al apuda pordo. Mi iris tien, eniris kaj ekvidis sinjorinojn sidantajn antaŭ ĝicetoj. Mute mi montris mian legitimaĵon, skribis la nomon de la k.do, kiun mi deziris viziti kaj ricevis paperaĵon kun kiu mi reiris al la soldatoj. Tiam ili permesis, ke mi eniru. En tiu okazo nur gestoj utilis kiel interkomprenigilo.

La de mi vizitoto forestis. Dum unu horo mi sidis en antaŭĉambro, kaj fine fraŭlino germanlingve komprenigis min, ke mi revenu je la dua posttagmeze. Mi do foriris. Survoje al la hotelo mi havis ŝancon renkonti Doriot, kiu venis ankaŭ viziti la sidejon. Klariginte pri mia maltrafo li konsentis akompani min kaj prezenti al k.do Rakoŝi, la Sekretario de *Ekzekutiva Komitato de Komintern*.

Ne tre akceptema estis Rakoŝi. Li alparolis min jene:

— Ha, vi estas k.do Lanty! Vian mandaton mi vidis; ĝi ne valoras por ni. Vian organizaĵon ni ne konas. Ĉu ĝi estas komunista? Ĉu vi konas ĉi tie esp.komunistojn?

(1) Vidi la novembran n.on.

Cetere ni ne povas okupiĝi pri esp.o. Ni havas tro da aliaj prizorgendaj taskoj, multe pli gravaj kaj urĝaj. Mi ne komprenas, ke vi venis ĉi-tien el Paris pro tia motivo. Vi elturniĝu kiel vi povos. *Komintern* ne povas pagi por turistoj...

Iom bolis mia sango. Kaj sektone mi respondis al Rakoŝi.

— Nu, ĉu do vi supozas, ke mi intencis gastigi min de *Komintern*? Neniel. Mi kutimas kontraŭe elspezi por la komunismo kaj tute ne vivas per la komunismo. Vi malpravas fari tian supozon koncerne min. Mi pagos el mia propra poŝo por mia ĉi-tiea restado. Sed regulan mandaton mi havas kaj nepre devas plenumi la al mi konfiditan mision.

Se la mondlingva afero estas por vi bagatelaĵo nu, mi prave malprave, kiel internaciisto, konsideras ĝin gravega. Homo kiel Romain Rolland ankaŭ asertas, ke la internaciistoj estas tute malpravaj malatentante tiun aferon...

— Ho, R. R. . . , literaturisto, ne komunisto, intermetis Rakoŝi kun malŝatema rideto.

— Se pri tiu temo ankaŭ valoras nur opinio de komunistoj mi do citu al vi la nomon de Henri Barbusse, kiu, kvankam literaturisto, estas komunisto. Li ankaŭ opinias, ke internacia lingvo estas nepre necesa por ke vivu vera Internaciano, ne Internaciano de poliglotaĵo ĉefoj.

— Ĉu vere H. B. interesiĝas pri tiu demando? iom mirigite demandis Rakoŝi.

Tiam mi prezentis al li ekzempleron de la lernolibro eldonita de *Federacio de revoluciaj esperantistoj franclingvaj* por kiu verkis H. B. antaŭparolon. Rakoŝi trarigardis la libron kaj diris:

— Bonvolu sidiĝi.

De tiu momento la tono de nia interparolado iom dolĉiĝis. Mi klarigis pri nia movado, montris la cirkuleron de l' Franca Ministro ktp. Post dudekminuta interparolado, Rakoŝi konfesis, ke eble nia agado povos utili la komunismon, sed konkludis, ke nun *Komintern* ne povas okupiĝi pri la demando.

Tiam mi respondis, ke tute ne estas mia intenco tedi la kom. gvidantojn per antaŭtempaj postuloj. Tia ne estas mia misio. Mi nur venis por esplori la laborojn de la *Studkomisiono por alprenado de helpa lingvo en la IIIa Internaciano*, kiu estis starigata dum la Ila Kongreso. Mi devas ekscii ĉu la komunistoj povas prave konsideri tiun entreprenon kiel seriozan kaj indan je atento de ĉiuj komunistaj mondlingvanoj. Kaj mi aldonis, ke kvankam mi estas esp.isto mi estas preta propagandi kaj instrui iun ajn lingvon oficiale alprenitan de *Komintern*.

Aŭdante la vortojn: "laboroj de la studkomisiono" Rakoŝi ridetis kaj tiam diris kion mi jam rezume raportis en la oktobra n.o de S. R. Li aldonis, ke neniu rajtas sin apogi sur la *Komintern* por propagandi iun ajn internacian lingvon.

Restis al mi nur peti oficialan ateston de tiu deklaro por esti plenuminta mian mision. Senhezite Rakoŝi liveris al mi la dokumenton, kies originalan franclingvan tekston niaj legantoj jam konas.

Mi plue devas noti, ke, pro neekzisto de esp. komunistaj organizaĵoj en Rusio, mia pozicio antaŭ Rakoŝi ne estis favora. Li eĉ min avertis, ke mi ne devas fidi al iu ajn esp.isto. "Multaj estas kontraŭrevoluciuloj", li aldonis, "Estu singardema, prudenta en viaj rilatoj kun esp.istoj..."

En Esperantio

Dank' al Sankta *Cirilo* kaj lia frato *Metodo*, la slavo havas specialan alfabeton. — Kaj tio ankoraŭ iom pli apartigas ilin de la aliaj popoloj. Okcidentano, kiu ne lernis la rusan alfabeton ne kapablas eĉ legi iun vorton. Sur la ŝipo, rusa K.do iomete instruis al mi la rusajn literojn. Mi do sukcesis legi la nomon de la strato, kie staras la hotelo "Lux". *Tverskaja*. Ĝuste sur tiu strato ankaŭ troviĝas la redaktejo de "La Nova Epoko", kiun mi intencis viziti. Mi do povis sen plano trovi la lokon. Tie mi trafis plej afablan kaj bonkamaradecan akcepton. Sonis esp.o bele kaj flue en la buŝoj de la rusaj samideanoj. Mi ne plu sentis min en fremda lando.



Sidantaj: G. Demidjuk, N. Nekrasov, V. Polakov. Staranta: N. Futerfas

Ĉeestis K.do *Nekrasov*, redakcia sekretario de la revuo, K.do *Polakov*, prezidanto de l' rusa sekcio de E. L. A. K.do *Demidjuk*, kiu okupas altan postenon en la ruĝarmeo, kaj K.do *Futerfas*, kiu kritikeme kaj bildriĉe parolas en vera oratoro, kia li estas.

Neniu el ili apartenas al la Komunista Partio. Ili nur simpatias la komunismon kaj lojale kunlaboras kun la Soveta Reĝimo. K.do *Futerfas* estas anarkisto. Iam li estis arestita pro falsa denunco. Amuza fakto: Ĉar oni trovis ĉe li multajn dokumentojn esperantlingvaj, estis la idisto *Milner* ("Ĉekisto") kiu esploris la esp.tajn tekstojn. Tial ke oni trovis nenion suspektindan, *Futerfas* estis liberigata.

Dirinte mian deziron ekinterrilatiĝi kun esp. komunistoj, tuj estis proponate al mi viziti K.don *E. Drezen*, kiu oficas en la Kremlo.

La morgaŭan tagon antaŭtagmeze, akompanate de *Nekrasov*, mi iris al *Drezen*.

Apud unu el la enirejoj de l' Kremlo, humile sin apogas al la fortika muro ligna budo, kie oni devas peti enirpermeson. Envicige ni staris proksimume duonhoron kaj fine ricevis la bezonatan enirpermesilon. Provizumite de tiu

paperaĵo ni aliris grandan portalon, kie vico da deĵorantaj soldatoj stare gardis la enirejon. Montrinte la enirpermesilon ni trapasis sub alta arkaĵo kaj trafis duan vicon da soldatoj, al kiuj denove ni devis prezenti nian rajtigilon. Poste ni transpasis grandan korton kaj alvenis ĉe impona konstruaĵo, kie deĵoranta soldato ankoraŭ unu fojon esploris nian paperaĵon. Trapaŝinte longajn, duonhelajn koridorojn ni fine venis al la ĉambro, kie oficas nia samideano.

Kvankam juna, Drezen okupas tamen tre altan postenon en la administra fako de l' Soveta Respubliko. Li estas vic-direktoro de *Tutrusia Centra Ekzekutiva Komitato de Sovetoj*. Tiun fakon oni kutimas nomi mallongige V.C.I.K. *Kalinin* estas la Prezidanto de tiu Centra Komitato, kiu estas (principe) la plej alta Instanco de l' Rusa Respubliko.

Tre afable kaj helpeme akceptis min Drezen. Li sin metis je mia dispono por faciligi kaj agrablighi mian restadon en Moskvo. Mi klarigis al li en kia situacio iom duba mi troviĝas en la hotelo "Lux", pro foresto de la reprezentanto de l' Franca Kom. Partio. Mi diris, ke mi trafas malfacilaĵojn por esti konsiderata kiel rajtigita delegito ktp.

Drezen telefonis ien, skribis letereton, kiun li donis al mi por ke denove mi vizitu la sidejon de l' *Komintern*; unuvorte klopodis tiele, ke de tiu momento ĉio glatiĝis antaŭ mi.

Ĉar en tiu momento nia samideano ne disponis sufiĉan tempon por longe preparoli diversajn aferojn, li petis, ke mi revenu posttagmeze je la 5a. Tiel estis interkonsentite.

Je la difinita horo mi revenis sola al la Kremlo. Post la kutimaj formalaj prieniraj mi denove troviĝis en la sekretario de l' Vic-direktoro de V. C. I. K.

Ĉar nia Samideano plenumas oficon en la administracia fako mi ne povis trafi pli bonan okazon por ekscii pri la strukturo kaj funkciado de l' Soveta Reĝimo. Mi do petis al Drezen, ke li bonvolu sin lasi intervjui. Tre afable li konsentis, kaj liveris al mi klarigojn, kiujn rezume mi konigos en alia parto de mia raporto.

Allo! . . . — Drezen telefonas, kaj, post minuto:

— Hodiaŭ vi estas mia gasto. Tuj venos aŭtomobilo, kiu kunportos nin hejmen. Vi vespermanĝos kaj konatiĝos kun mia edzino.

Ĉu oni povas rifuzi tian afablan proponon? Kvankam iom ĝenate, mi povis nur danke akcepti. . .

Post kelkaj minutoj ni veturas tra la kortego de l' Kremlo, kaj rapide alvenas al la *Spàsskije voròta* (Sav-pordego). Drezen klarigas pri la sankteco de l' loko. Eĉ la caro demetis la ĉapon, kiam li trapasis ĉi-tien. — Dum ni malpiege malatentas tiun antaŭrevolucionan kutimon kaj trapasas kiel en tute ordinara loko.

Sur la turo de tiu pordego estas granda horloĝo, kiu, je la 9a matene kaj je la 9a vespere, ludas per sonoriloj ĉu *Internacion*, ĉu *Funebran Marŝon*. Antaŭ la Revolucio ĝi ludis la caran himnon: "Dio la caron gardu" kaj iun preĝon. Apenaŭ emociata mi estas. Strange. Kial entuziasmo ne flamigas mian koron? Jes, kial? Mi ne povus nun respondi.

Post kvaronhora veturado ni alvenis ĉe mia gastiganto. Lia ĉarma edzino ne parolas esperante, sed malgraŭ tio ne estas malpli afabla. Cetere ĉu estas necese paroli kiam oni sidas antaŭ tablo abunde provizumita per bongustaj

manĝaĵoj. Simpla rideto sufiĉas por montri kontentecon. Certe mi ne bedaŭras mian neĉeston ĉe la vespermanĝo en la hotelo "Lux"! . . .

Drezen prave fieras pro sia esp. biblioteko. Kun granda intereso mi povis foliumi kolekton da libroj raraj, kies ekzisto rakontas la historion de la mondlingva movado. Nia samideano nedubeble havas fortan ŝaton al esp.o. Mi konstatis kiom ame li parolas pri nia afero. Sed la vivo estas trudema. Lia ofico forprenas lian tempon kaj li malmulte povas okupiĝi pri nia afero. (1)

Kompreneble ni interparolis pri nia S. A. T.-movado. Ŝajnas, ke ni ne interkonsentis. Drezen riproĉas, ke S. A. T. ne estas pure komunista. Li ne volas kunlabori kun anarkistoj kaj socialdemokratoj. Sed, strange, li estas prezidanto de *Sovetlanda Esperanta Unuiĝo*, en kiu estas ne nur anarkistoj sed burĝoj el plej certa speco. Tiun kontraŭiron ĝis nun mi ne sukcesis klarigi.

*

Mi revidis Drezen kelkfoje ĉe la *Moskva Klubo Esp.-ista*, (2) kiu estas malfermita ĉiutage de la 7a vespere ĝis la 9a. La kunvenejo de niaj Moskvaj samideanoj troviĝas en la strato Bolŝaja-Dmitrovka, 12. Preterpasantoj povas vidi surgluitan ĉe la vitraĵo de butiko, ne revolucionan esp. gazeton, sed *Esp-on Triumfontan!* . . . Se oni alproksimiĝas kaj premas sian nazon kontraŭ la malpuran vitraĵon, oni ekvidas ĉe muro grandan portreton de Zamenhof kaj malgrandajn portretojn de Karl Marx kaj de H. Barbusse. La Klubo enkalkulas 80 membrojn proksimume, estas al mi dirite. Sed ŝajnas, ke la propagando ne estas vigla kaj trafe farata. Mia impresado estas, ke ne tie estas la kerno, al kiu povos alcentriĝi la fortoj kapablaj antaŭenpuŝi nian aferon en la revolucia Rusio. Eble ĝi estas ĉe "La Nova Epoko."



E. Drezen

Eble ĝi estas ĉe "La Nova Epoko."

*

Riĉa je poetoj estas la rusa esp. movado. Nekrasov kaj Polakov kutimas rajdi Pegason. (3)

lun tagon ruĝarmeano, akompanate de Polakov, venis al mi. Ili alportis kolekton de poeziaĵoj por ke mi elektu la presindajn en S. R.

La morgaŭon, Nekrasov ridetis aŭdante min rakonti pri la vizito de "soldato", K.do *Rozenblat*. Demandite de mi

1) Li tamen antaŭnelonge verkis ruslingve pri la problemo de lingvo internacia broŝuron en kiu li provas pravighi la vidpunkton de la mondlingvanoj laŭ la Marksana Doktrino.

2) La Prezidanto estas M. *Valentinov*, kiun nome konas niaj legantoj.

3) Oni vidu ĉe "La Angulo de l'Poetoj."

pri la kaŭzo de lia mokemo, Nekrasov respondis, ke tiu "soldato" estas simple... generalo! Rozenblat estas juna, eble 26-jara. Nu, ĉiam mi prezentis al mi generalon grizhara. Mi tute forgesis, ke ankaŭ Napoleono estis generalo je sia 25-jaraĝo. Verdire grado de generalo, laŭ la kutima senco, ne ekzistas en la ruĝarmeo. Tamen la komandrajteco de nia samideano rilatas al tiu de brigadgeneralo en la franca armeo. Ĉar nia generalo ŝatas poezion, estas komunisto, verŝajne li neniam fariĝos ia Napoleono. Esperinde!...

Kial do je la eksteraĵo mi ne rekonis la gradon de tiu ruĝarmeano? Tute simple, ĉar li aspektis eĉ malpli komforte ol la plej simplaj germanaj aŭ francaj soldatoj. Li ne eŝtis ornamaĉita per galonoj, kaj mi ne atentis pri la lanaj steloj, kiujn li portis ĉe la maldekstra brako.

Mi rakontas tion, ĉar tiu simpla fakto elokvente montras kiom diferencas la venkinta ruĝarmeo de la kapitalistaj armeoj.

*

Dum debata kunveno, kiun okazigis Moskva Klubo Esp.-ista, mi havis okazon konatiĝi kun aliaj esp.-istoj. Mi ankaŭ eksciis, ke Kotzin fariĝis komunisto — kaj ne plu okupiĝas pri esp.-o. Devjatnin estas nun en Kĭev — kaj silentas.

Mi havis impreson, ke la esp. komunistoj preskaŭ hontas pri sia esperantisteco. Ĉar la gvidantoj de Komintern ne interesigis pri la afero, ŝajnas, ke niaj samideanoj timas sin kompromiti farante propagandon en komunistaj rondoj. La severa disciplino komunistaj sufokis ĉe multaj la entuziasmon kaj la fervoron por esp.-o.

Plie, la bedaŭrinda fiasko de E. S. K. I. — Esp. kom. organizaĵo pri kiu estis kelkfoje raportite en S. R. — kaŭzita pro maltrafaj klopodoj de senprudentuloj, ankaŭ kaŭzis disreviĝon kaj malkuraĝiĝon. Komprenoble la ekonomia situacio ankaŭ malfaciligas la propagandon.

Ekzistas en Rusio multe da lertaj esperantistoj. La grundo ankaŭ estas plej bona por prisemado de la ideo pri lingva internaciigilo. Sed niaj rusaj samideanoj, se ili volas sukcese agi en komunistaj rondoj, devas nepre forlasi la malnovan, neŭtralisman propagandsistemon.

Espereble ili ekkonscios pri la grava rolo, kiun ili povas ludi en nia movado. Ili fine trovas la ĝustan vojon. Jam S. A. T. enradikiĝetis en kelkaj rusaj centroj. Mi plene interkonsentis kun la K.doj, grupiĝintaj ĉirkaŭ "La Nova Epoko." Kaj nedubeble niaj aranĝoj plej bone efikos por la sukceso de la mondlingva afero. (Daŭrigota)

E. L.



S. A. T. kaj historia Instruado

La Centra Komitato de S. A. T. decidis, ke ĝi estas preta eldoni internacian historilibron kun helpo de ĉiulandaj antaŭenemaj edukistoj. Ĝi konsideras ke unu el la plej gravaj devoj de S. A. T. estas la lukto kontraŭ la internaciaj malamoj kiuj ebligas, daŭrigas kaj neprigas ĉiajn militojn. En ĉiu lando la historiaj lernlibroj kripligas la „elastan“ historian veraĵon kaj iom post iom inokulas en la infanan cerbon ŝovinismon.

La S. A. T. edukistoj jam preparis bonan laborplanon sed la entrepreno estas tiel ampleksa, ke helpo de ĉiulandaj anoj estas necesega. Nova edukado povas esti nur bazita sur sociaj faktoj kaj interesas ĉiujn eĉ needukistojn. Edukado estas revoluciiga forto kaj S. A. T. estas antaŭ ĉio Eduk-asocio.

La tasko estas duobla: unue, detrua, due: konstrua:

Jam estas komencita interŝanĝado de historiaj ĉiulandaj lernolibroj kaj ankaŭ kritikado de ties ŝovinismo. Plej bona metodo estas jena: interŝanĝo de lernolibroj okazos inter la „centjare malamikaj landoj“

Unua grupo: Germanio, Francio kaj Anglio.

Dua grupo: Aŭstrio kaj Italio.

Tria grupo: Belgio, Nederlando kaj Hispanio k. t. p.

Tre trafa estus la komparado de tekstoj kaj bildoj pri la franca grandrevolucio (1789) uzataj en la diversaj nacioj por evidenti trompemon de ŝovinismo ĉiunacia.

Samtempe kun la detrua laboro ni ekstudis konstruan verkon per eldono de historilibreto internacia destinata al gepatroj kaj edukistoj. Tiu verko estos poste multpreza gvidilo por eldono de ĉiunaciaj lernlibroj en kiuj historio tuthomara senĉese plilarĝigos la mallarĝan horizonton de la nacio.

Ni bezonas informojn kaj bildojn ĉiulandajn pri pra-historio, epoko de la plej grandaj nekonataj geniuloj de la homaro — pri la ĉiulandaj bonfarantoj de la mondo (biografiojn).

Ni bezonas ankaŭ tekstojn mallongajn pri la plej belaj naci-historiaj paĝoj rilate materialan aŭ moralan vidopunkton por ke ĉiuj gepatroj, edukisto kaj infano konatiĝu kun la partopreno de la najbara popolo en la tuthomara komfortigo.

Ni ankaŭ intencas eldoni en esp.-o poŝtkartojn aŭ rekompencajn bildojn al infanoj destinatajn por al ili rememorigi la vivon de la grandaj bonfarantoj kaj historio de la plej gravaj inventaĵoj.

Ĉiulandaj S. A. T.-anoj, kunlaboru!

Sendu historilibretojn kritikotajn!

Sendu sugestojn kaj dokumentojn!

Sendu bildojn kaj poŝtkartojn!

Mi kolektas la tutan materialon.

Marcel Boubou

96, rue St. Marceau, Orléans (Loiret), Francio

**Ponumeraprezado de S. R. por Francoj
kostas 1 fr. kaj por kurzsuferantaj lan-
doj 1/10 de l'tuta jarabono.**



La Angulo de l' Poetoj

LABORISTA KANTO

Proletarioj de ĉiuj landoj,
Ni vin alvokas al unuiĝ'!
Al nia regno mankas limrandoj —
Ĉie atendas vin la fratig'!

Socialismo — regno lazura
De la Libero, Am' kaj Fratec':
Tie ripozos manoj malpuraj,
Krudlaborantaj por tirane'.

Kapitalismo — regno riĉula
De senkompata, monstra perfort':
Tie ĉi fia mallaborulo
Luksan akiras per nia mort'.

Ĉiam antaŭen! Al la batalo
Kontraŭ vampiro — kapitalism'!
Brilas proksime la idealo —
Nia justregno Socialism'!

Kamiŝin, 22. IX. 1917

Originala — V. POLAKOV

(1) Linoleuma gravuraĵo de studiano el Moskva "Proletkult".

EN MALLIBERO

1.

Mi travivis teruron
En la noktoj mallumaj, malvarmaj.
Febran dormon rompadis
En meznokto trumpeta signal'.
Apogante sur kruron,
Mi levadis min time-alarme,
Tra mallumo rigardis, —
Ĉu kolombo kaptita, ĉu agl'.

La koreto batetis.
Kaj antaŭe svarmadis la ombroj,
Grizaj ombroj de l' homoj
Sin puŝantaj haose al pord'.
Oni kuris kaj petis.
Akra vento svinganta oktobra,
Kiel band' de fantomoj,
Furiozis, flugante el nord'.

Pala floko de l' luno
Super kapo traglitis apenaŭ.
Lignaj ŝuoj sur ŝtonoj
Sonoradis per laŭta frapad'.
Bruldoloris la vundoj
Pro pikiloj de feraj fadenoj.
Kriminacis ordono
Kaj ĝin sekvis ĝemplendo kaj bat'.

Febre tremis la manoj
Ricevante avide kafakvon,
Ete varman, sengustan
Kaj momente trinkatan jam for ...
Malliber' malhumana!
Ci do prenis sufoki min ankaŭ,
Faliginte sur bruston
Pezan jugon de kruda dolor'!

2.

Milda suna radio
Jen salutas min: "Bonan matenon!"
Penetrante tra truo
En la difektiginta tegmen'.
Kvazaŭ bela vizio
Konsolplenan kvietan ĉagrenon,
Dancetante en fluo,
Ĉi donacas anstataŭ turment'.

Kaj kun ĝoj' el angulo
Mi rigardas al griza amaso
De la homoj malpuraj
Prensidantaj sub nigra medit'.
Kamaradoj! Karuloj! ...
Sed subite sufokas min spasma.
Ree venas teruro
Kaj sur frunto aperas la ŝvit'.

El la urboj laboraj,
El la vastaj parencaj vilaĝoj
De la lando ribela
Iris vi kun la ruĝa standard'.
Fremda forto rigora
Kontraŭstaris al via kuraĝo,
En la horo malhela
Faris sklavo vin stulta hazard'.

Mia viv' malfeliĉa
Kun la viaj ligiĝis akorde,
Kaj en via medio
Por mi estas plej granda mister'
Fantaz' -superstiĉo
De la vento bruanta el nordo
kaj de l' suna radio
Dancetanta en flu' de l' aer'.

Militkaptitejo en Strzalkowo-Pollando
Decembro 1920

N. NEKRASOV

La akuzanto

De Armin T. Wegner

Tio ĉi estas prenita el la verko "Der Ankläger," kies aŭtoro afable permesis la tradukon kaj enpreson en S. R. "Der Ankläger" (la akuzanto) estas nomata la libreto kaj vere ĝi akuzas. Akuzoj de l'ekzistanta "ordo" estas la plej multaj ĉapitroj el ĝi. Al la lumo de la ekono estas tirataj la sekretaj kaŭzoj de la okazintaĵoj kaj de tio, kio okazas ĉiutage en la civilizita mondo. Ĝi akuzas la profitecon, la ekspluatadon, la ambicion, la individuon, la homamason, la senfortulon, la juĝiston, la leĝaron, la ŝtaton kaj ĉion malbonan, kio estas ĉe la kulturo. Tra la tuto kiel ruĝa fadeno gvidas la voko: "Ekkonu vin, pretigu la revolucion de via persono." Tia spirito, plantite en la korojn de la homaro, kreskigus la mondrevolucion kiel subitan maran alfluegon. — La libreto (56-paĝa), kiun varme rekomendas al la germanlingvaj kamaradoj la tradukinto estas havebla ĉe: Verlag "Der Syndikalist," Berlin O 34.

Mi akuzas: la teron, kiu kreis min, la nekompateman naturon, kiu nin jetis en la nesolveblan dubon pri homesto, el kiu neniam ni povas elŝteliĝi.

Mi akuzas: la dion trompema masko de l'eterna amo, la ventron, el kiu ni eliĝis en senfina ĉeno, kun malhela heredo de la malamo.

Mi akuzas: la landon kaj la urbojn; la malgajan solecon kaj la kunprematan aregon de l'dolorplena amaso; la leĝojn, la ministrojn, la popolon; la ekspluatanton kaj la ekspluataton; la malsaĝecon kaj la instruitismon — fi pro vi, studentoj, kiuj genufleksas antaŭ la vortoj de la malheleco kaj kure sekvas la eternan nesufiĉon!

Mi akuzas: la partiojn kaj iliajn programojn; la justecon kaj edzecon, vian brutan kaj senpensan kunestadon; la maljunajn virinaĉojn, la cerbojn superkrustitajn polve. Kaj tiujn, kiuj diras: "La homoj ja estas tiaj!", tiujn mi volas persekuti speciale.

Neniam mi indulgas, sed malpleje min mem:

Revoluciulo, kontraŭpatrioto, popolentuziasmiganto, anarĥiisto, proletario, ribelemulo; revulo, utopiisto, predikanto de malobeado, amiko de senheredigitoj, elpelitoj, kun pasia amo al ĉiuj kaptitoj kaj krimuloj.

Mi alportas nenion novan, mi nur ripetas. Mi daŭrigas tiun ĉi akuzon, kiun oni forgesis, kiu estas pli grava ol ĉiuj novaj formoj kaj enhavoj. Mi fieras apliki la malnovajn pensojn kaj ideojn de la grandaj eternaj majstroj.

O mondo, tute plenigu min per viaj suferoj! Krevu en mi, tempo; en mia animo fermentu, revo, malbeno, furiozo de la nesavistoj, por ke mi neniam ĉesu maltrankviligi, antaŭenpeli, revoluciigi tiel longe, kiel potenco spiras, la posedaĵoj ne estas transdonitaj, ĝis la riĉeco vomas, ĝis venas aliaj post mi por daŭrigi la admonadon — akuzanto, juĝanto, profeto de malproksima tempo, en kiu mi estas hejme, kiel mia tablotuko.

Tradukis H. M.

* Lernu diri multon per malmulte da vortoj.

*

Kiu ne kapablas verki en sia gepatra lingvo, tiu ne opiniu esti kapabla verki en esperanto.

Vin mi celas!

De Armin T. Wegner

Vi, kiun mi ne konas, sablero inter la multaj, respublikano, ano de tiu ĉi barbara urbo, donu la manon al mi. Kial vi deturnas vin kaj strabas al la dorso de la aliaj? Vi estas, kiun mi atakas. En vi estas la kulpo, la komenciĝo de ĉiu sklaveco kaj de ĉiu milito. Mi knedas vian animon, refaldas ĝin kiel kunpremitan ganton — sed, kio elvenas? Malgranda vanteco, kurba fingro de la havemo. Ĉu tio estis via revolucio? Tiuj amasoj sur la stratoj, kriado, pafoj, paroladfragmentoj? Nenio okazis, ĝis via animo estos ŝanĝiginta.

Ĉu vi neniam sentis la nevideblan potencon, la solece batalantan penson, kiu liberigas sin de ĉio, kio estas estinta: amikeco, gajno, multe antaŭ ol ĝia timinda erupcio atingos vian okulon, pro kies plej profunda konsekvenco vi ektimas? Ni atendas vian prezentigon, la revolucion de via koro, pli gravan ol ĉiuj politikaj kaj socialaj revolucioj. Vin mi celas! Vian memon, kiun mi ne lasos kvieta. En vi komenciĝis. Benata estu la ribelo de viaj sendormaj noktoj, la akra dubo, la eterne ripetiganta ekzameno de la konscienco. Ne ekzistas leviĝo de la amaso sen la revolucio de la mio.

Sed pripensu, ke la ĉefaĵo ankoraŭ devas veni kaj, ke ni ĉiuj, nur estas ŝtupo. Kial vi hezitas? Ne valoras la povo, sed la bonintenco. Ĉu vi volas esti mia frato? Ni iru kune parton de la vojo!

Tradukis H. M.

La kapitalismo edukanto kaj punanto de krimuloj

de Senheredigito.

II.

La ĉambrego de kinematografejo estas tute plena. Triono el la ĉeestantoj estas gejunuloj-infanoj — Senpacience oni atendas la komenciĝon. Subite la lampoj, kiuj ankaŭ brulas dumtage, estingiĝas. Nun ĉiuj rigardoj estas streĉe direktataj al la blanka tolo sur kiu aperas vivecaj figuroj. Jen la programo:

„Veneniginta sin pro malfeliĉa amaĵo,“ Vive fermasonita, „Sorĉa artisto,“ „La ĉaso al rabisto,“ „Kvinfoje edziĝinta,“ „El la vivo de cigano.“

Avide kaj plezure la gejunuloj encerbigas la vidatan. Kelkfoje aŭdiĝas voĉoj: „Brave,“ „li estas prava“ k. t. p.

La programo finiĝas „Ho, kiaj belaj estis tiuj prezentintaĵoj,“ oni povis aŭdi, de proksimume dek sesjaruloj, „Ni baldaŭ ree iros al la kinematografejo.“ Sur la strato la gejunuloj ankoraŭ preparolas la ĵus travivitajn. Kelkiuj el ili haltas antaŭ librovendejo, rigardas la titolojn de abunde elmetitaj libroj: „Jen bela libro - la orserĉanto en Usono - voĉo laŭtigas.“ „Mi preferas rakontojn pri Hindoj diras aliu. Bela etulino subite montras per fingro al libro dirante: „Tiu ĉi — la marrabistoj — ŝajnas al mi la plej leginda.“ Tiumomente la negocema librovendisto eliras kaj afable invitas ilin eniri la vendejon. Unu post alia malaperas en la internon por aĉeti jam delonge deziritajn librojn.

En la proksimo troviĝas juĝejo, en kiu estas kunveninta la kompleta „aparato“ por juĝi pri viktimo, kiu eniris la maŝaron de trifoje sangigita leĝo. Sur la porakuzita benko sidis dekokjarulo iom timeme rigardante la ĉirkaŭantaron. Jen la krima faro. Junuloj en arbaro estis imitantaj ĉason al Hindoj. Tute laŭ maniero de militistoj oni manovris. Unuj el ili estas la atakatoj —

Hindoj — la aliaj, atakantoj — soldatoj —. Dum la „batalo“, okazis, ke unu el la atakitoj de la akuzito estis batita tiom forte, ke la batito baldaŭ poste mortis. — Severa juĝisto nun demandas la junulon pri lia ĝisnuna vivo: Liaj gepatroj nemalriĉaj klopodis eduki la infan. on kiel plej eble bone. En la lernejo li estis unu el la plejkapabluloj, tamen la instruistoj plendis, ke oni ĉe li ofte trovis literaturaĉon, kiun li legis sekrete. Tio malhelpis lin pliprogresiĝi. Demandite pri tio, ĉu li la kinematografejon ofte vizitis, li jesas. Depost la dekkvara vivjaro li partoprenis instruadon en superlernejo kaj gimnazio. Dum sia libera tempo li sin okupis en unuigo de Skoltoj. La juĝisto nun demandas lin, ĉu li intence aŭ hazarde mortigis la forkurantan „kontraŭulon“, kion la akuzito prirespondas jene: En la varmeĝo de la batalo.“

La juĝo estas „kvin jarojn da malliberejo.“ Pli akra estus la puno, sed oni indulgas konsiderante la junecon de la punato. (Daŭrigota.)

Leterkesto

Homfrato (Wien). Dudek paĝojn el S. R. ni bezonus por enpresigi ĉion, kion ni ricevas pri lokaj okazintaĵoj. Tiaj aferoj ne povas interesi tutmondan legantaron. Estas via surloka tasko kontraŭbatali tion, kion vi juĝas malbona, sed ne la nia. Vi trovos en la broŝuro: „For la neŭtralismon!“ la celon de S. A. T. — kiu tute ne estas *malhelpi* la progreson de esp. o en burĝaj rondoj. Ni povas nur rediri: esperanto estas *ilo*, la laboristoj uzu ĝin por siaj klasaj profitoj. — La demando pri aliĝo de policistoj al S. A. T. estas debatita dum la kongreso. Nun ni atendu la rezulton de la ĝenerala voĉdono. — *Red.*

A. M. (München). Volonte ni enpresus vian respondon (?) al k. do R. G. Sed, ĉar ni mem ne sukcesis kompreni tion, kion vi volas diri, ni supozas, ke niaj legantoj ankaŭ ne komprenus. Ekzemple, kion signifas tiu via frazo: „... kvankam mankas al la statuto la gravaj vortoj pruvitaj internacie kaj ili estas tute sennacieca.“ (Tiel.) Vi eĉ ne sukcesis rekopii senerare frazojn el la letero de R. Rolland. Ni tre konsilas al vi legi la broŝuron „For la neŭtralismon!“ kaj precipe mediti pri la enhavo de la 7a paĝo. — *Red.*

Z. S. (Barcelona). Via dudek-unupaĝa skribaĵo estas nur subjektiva babilado, sed ne objektiva raporto pri la vera stato de la laborista movado en Hispanio. Nia legantaro bezonas scii: 1. Kiom da anoj havas a) la diversaj sindikatoj. b) la revoluciaj partioj; 2. Kiom havas tiuj organizaĵoj da gazetoj kun la nombro de legantoj ktp. Ĉiuj surstrataj atencoj ne indas esti priskribataj. Sufiĉas diri: „Dum ses monatoj okazis tiom da atencoj.“ Kolektu faktojn, ordigu ilin laŭ bone pripensita plano kaj verku klare, ne forgesante, ke vi skribas por tutmonda legantaro. Por fari bone ellaboritan raporton, ni konsilas opan kunlaboradon en via grupo. Miaj rimarkoj ne intencas malkuraĝigi vin, kontraŭe. Memoru, ke nur „forĝante oni fariĝas forĝisto.“ — *Red.*

Al kelkaj (multloke). Vi skribis: „Bonvolu presigi mian tradukaĵojn (aŭ artikolon) en la plej proksima n. ro de S. R.; ... Respondu tuj mian demandon ...“ ktp. Vi forgesas, ke eĉ se viaj postuloj estus plenumindaj, ili tamen ne ĉiam estas plenumeblaj, ĉu pro manko de loko en la revuo, ĉu pro manko de tempo niaflanke. Oni ne forgesu, ke nian redaktoran taskon ni plenumas post nia panakira laboro. — *Red.*

K. doj H. S. kaj T. W. (Groß-Schönau). Via alvoko estas tro longa por esti presata. Cetere ŝajnas, ke ĝi precipe rilatas al la fako: „Korespondado“. — *Red.*

Deubler-M. Viaj kotizoj estas malgrasegaj. Legu mian artikolon kaj la informilon en dec. n. ro. — *F. C. Richter.*

PRESERAROJ

Pro manko de tempo ni ĉiam devas tre rapidi en la finkontrolado de l'presprovaĵoj. En la lasta n. ro troviĝas kelkaj, kiujn bonvolu la legantoj korekti mem. — Kio estas facila, ĉar la eraroj ne povas igi duba la sencon. Oni tamen notu, ke en la artikolo de R. A. Fanta anstataŭ „riĝegulo“ devas esti: *riĉegulo*; anstataŭ „fantaria“ devas esti: *fantazia*. Paĝo 16, anstataŭ „emintuloj“ oni legu: *eminentuloj*. En la „publika letero al R. Rolland“, paĝo 13, oni forstreku la prepozicion *al*, ĉe 5a linio, dua kolono de supre.

ELĈERPAĴOJ

Revo kaj realo

La idistoj denove provas etendi siajn brakojn al la neniam por ili favora Rusio. En aprila n. ro de „Mondo“ ni legas: *Anciena Rusia esis fortreso di esp. o, nova Rusia mustar divenar fortreso di ido.*

„Pri fortreso di ido“ en Rusio ni nenion konkretan scias, krom la skandala blufado pri la „studiokomisaro tute neutra relate esp. o ed ido“, sed fakte estinta pure idista entrepreno kaj nun jam antaŭtempe likvidita ... Sed ekzistas veraj „fortresi“ de ido, ekzemple en la sama „Mondo“ pĝ. 176: *Me komencis studiar lingui en la jaro mil e sepa cent e triadek e triesma* (komparu kun esp. mil sepcent tridek tria).

„Tiaj lingvaj fortikaĵoj neniam pravigos idon ...“

Ni devas resume rimarkigi la plenan senhavecon de l'ido-revuoj. Ido ĉiam vivis per lingva diskutado kaj kalumniado pri esp. o. Nun tiu tempo post milfoja ripetado jam estas elĉerpita. Ne havante sufiĉan uzantaron por aplikado, ido nun okupas sin pri ... reformo de propra insigno ... kaj tutajn numerojn de sia akademía organo dediĉas al tiu problemo.

Tio pliafoje pravas plenan spiritan mizercon de la tuta afero de ido. La granda socia movado, estigita de la mondlingvo pasas preter ido.“

(El „La Nova Epoko“, Moskvo, kajero tria)

*

Ei la sama kajero de tiu interesa revuo ni ankoraŭ ĉerpu la jenon pri la organiza problemo esperantista:

„... Estas klare, ke konforme al la nova periodo kaj pera laborometodo nepre kreskos esp. aĵ unuigoj, kies celo estos nur aplikata. Lokaj kaj naciaj organizaĵoj ne plu estos bezonataj. Ilin anstataŭos nur internaciaj fakaj peresperantaj organizaĵoj. Ili estos kerno de estontaj vere internaciaj homaraj organizaĵoj diversfakaj ...“

*

Persekuto progresigas esperanton

En „Verda Utopio“, la interesa revueto de niaj japanaj k. doj-rusa samideano, *I. Serišev* raportas pri siaj „impresoj pri Japanio“. En tiu raporto estas parolate pri alia Ruso, blindulo, kiu estis elpelata kiel agento de l'rusa bolŝevismo en Japanio. Tial ke la elpelito estis esp. isto la gazetoj kulpigis esp. on, ke ĝi estas endanĝerigilo por la Ŝtato. Pri tio skribas la Red. de V. U en la septembra n. ro:

„... Kiel la afero influis sur la esp. an movadon en Jap. ...“

Tokiaj gazetoj informis grandlitere: „Japana Esp. o Instituto sekrete propagandas politike danĝerajn ideojn en nomo de esp. a kultura movado“; aŭ: „Nigraj okuloj de Tokio Metropola policojo nun suspekteme ekmoviĝas sur la Instituto“ ktp. Certe la afero kaŭzis al la burĝaj esp. istoj grandajn terurojn kaj indignon. Kaj vere estas, ke nigraj okuloj de la polico ekmoviĝis sur nia movado, kaj ke nia senlaca batalanto S. ro K. Ossaka kaj liaj familianoj estis kaj estas ankoraŭ nun ĝenataj per ofta alvizio de spiono. Sed ankaŭ vere estas, ke pro la afero de *Eroŝenko* (la blindulo) nia movado ne estis malhelpata, sed kontraŭe la afero aliris al nia movado grandan atenton de publiko kaj samtempe vekis scivolemon al esp. o. Tion pravas, ke post la afero la anoj de J. E. I. mirinde pligrandigis tagon post tago.“

*

Niaj Universalaj Esperantokongresoj

S. ro *O. Bünemann* en la oktobra n. ro de „Vegetarano“ provas pravigi la okazon de neŭtralaj esp. aĵ kongresoj. Por tio li diras: „Ili (la kongresanoj) ne volas esti fakuloj. Ili ne volas diskuti pri materialaj demandoj el siaj metioj aŭ profesioj. Ili ne volas vidi personojn, kun kiuj nur materia intereso ilin ligas. Ili volas fine, fine esti homoj, homoj en la plej bela senco de la vorto, en la senco de la homaranismo, kiun predikis Zamenhof ...“

Neniu estas pli blinda ol ti-kiu ne volas vidi. Ĉu vere ili estas nure homoj tiuj kongresanoj, kiuj kolektiĝas sub sian nacian flagon? tiuj Italoj kiuj akre protestas, ĉar la Kongreskomitato forgesis la italan flagon? Tiuj naciistoj kiuj ĉiam parolas je la nomo de sia lando? Nure homoj! Ekzistas jam kelkaj. Ili kolektiĝis sub la ruĝverdan standardon de S. A. T. Estas la sennaciuloj.

Estas malbonuloj (maliculoj), kiuj estus malpli danĝeraj, se ili nenian bonecon havus.

La ROCHEFOUCAULD

Finfina vorto

Ĉiuj K.doj estas certe jam tute konvinkitaj, ke la informo pri ido ĉe „Komintern“ estis nur sentima mensogo, kiun volis ekspluatadi senskrupulaj idistoj. Mensogoj estas iafoje vivdaŭraj. Tial estas necese ĝisfunde elradikigi la ĝermon de tiu idista intrigo. Por la lasta fojo ni do iomete priparolu la demandon.

Neniam ni neis la ekziston de la *Studkomisiono por alpreno de helpa lingvo ĉe „Komintern.“* Ni eĉ ĝojis pro ĝia starigo kaj pri ĝi sciigis nian legantaron.

Tiu komisiono havis kiel taskon ekzameniĝi de sciencaj ekspertizistoj la prilingvan demandon kaj submeti raporton al la *Ekzekutiva Komitato* de l'„Komintern,“ kiu devis ties konkludojn sankcii.

Nu, estas absoluta certeco, ke la Komisiono submetis antaŭ ĝia likvido, neniun raporton al la E. K.

Kiel novan pruvon ni publikigas ĉi-sube eltiron el letero de *Boris Souvarine*, kiu dum longa tempo restis en Moskvo kiel reprezentanto de l'*Franca Komunista Partio*.

Tiu letero estis adresita al K.do *Garin* el Lyon (Francio): „ . . . Neniu rajtas sin apogi sur la opinion de la „Komintern“ por rekomendi iun aŭ alian el la lingvoj nurie propagandataj. La rezolucio, kies unu el la subsignintoj mi estis ĉe la III.a Kongreso tutmonda, diris simple, ke estas dezirinde alpreni internacian lingvon kaj ke la Studkomisiono devas funde esplori la demandon. *Tiu Komisiono apenaŭ laboris kaj precipe neniun konkludon submetis al la „Komintern.“*“

Tiu valora atesto plene konfirmas kion mi diris en la oktobra n.o.

Nu, estas okultranĉa fakto, ke *Itchner* celis nur profiti sian sekretariecon en tiu Studkomisiono por propagandi idon sub kvazaŭa patronado de l'„Komintern“.

Tian agmanieron devus mallaŭdi ĉiuj lojalaj mondlingvanoj. Kiam ni ekciis, ke la informo pri deviga instruado de esp.o en Rusio estis nevera, senhezite ni sciigis en la februaro n.o de S. R. nian legantaron pri tio.

Sed ŝajnas, ke la tuta idista movado konsistas nur el senskrupulaj intrigoj. Anstataŭ lojale konfesi, ke la Studkomisiono ne povis, pro diversaj kaŭzoj, plenumi sian mision, certaj idistoj — ni diras certaj, ĉar ni volas ankoraŭ esperi, ke en la ldistaro ne ĉiuj aprobas blufon kaj intrigon — malespere alkroĉiĝas al la *Itchnera* faro. La „decido“ de la Studkomisiono estas por ili kvazaŭ panpeco en la manoj de malsatulo. Tial ke la oficiala dokumento liverita de *Rakoŝi* neniigas ilian planon, ili preskaŭ freneziĝas kaj elpensas plej mirigajn klarigojn, koncerne la neekziston de raporto pri la laboroj de la fama komisio. La legantoj juĝu mem:

„*La klefo dil Enigmo*: Ni informas ke la deklaro obtenesis da k.do *Rakoczi* ye la sequanta kondicioni: La sekretariano dil *Komintern*, kande il volis konsultar l' autentika texto dil raporto di la *Studkom*, konstatis olua des- aporo ek la registro. Quale, on povas forsan konjektar. . . “ 1)

1) *La klarigilo de l'Enigmo*: Ni estas informataj, ke la deklaro de K.do R. estas havigita sekvantkondiĉe: La Sekretario de l'*Komintern*, kiam li volis konsulti l'aŭtentikan tekston de l'raporto de la *Studkom*, konstatis ties malaperon el la registro. Kiel, oni povas eble konjekti . . . “

Oni admiru la suspektigan aludon. Tiuj fanatikaj idistoj sendube mezuras la esp.istojn laŭ sia propra mezurilo. Ili estus eble kapablaj formalaperigi raporton favoran al esp.o. Sed oni ne forgesu, ke la „malaperigita“ (?!) raporto devis esti publikigata. Kaj jam de preskaŭ unu jaro ni vane atendas ties publikigon. . . .

Sufiĉe! Ni ne perdu la tempon okupiĝante pri tiu definitive likvidita afero, kaj konkludu jene: Ti-kiuj uzas la aŭtoritaton de l'*Komintern* por propagandi idon estas simple malhonestuloj. . . .

E. L.*)

Oferemo kaj Ŝparemo

Ĉiu ideala movado bezonas gek.dojn kiuj praktike aplikas ĉi tiujn du vortojn: „Oferemo — ŝparemo“ kaj ĉar nia organizaĵo estas starigita sur revolucia fundamento, ni, de neniun riĉulo aŭ ĉokoladfabriko ricevas monon. Sekve, la prosperado kaj kreskado de nia S.A.T. estas nia propra afero. Kaj se ni ĉiuj estas veraj idealistoj, nia organizaĵo povas fariĝi la plej potenca en la mondo. Mi ne volas fari ditirambon al niaj k.doj kiuj *senpage* oficas en nia S. A. T. post la taga laboro kaj krom tio ankoraŭ oferas materialajn elspezojn, sed estas necese ke oni menciu tion, por ke aliaj k.doj estu informataj: Ekzistas k.doj, kiuj kredas verkante aŭ tradukante artikolon por S. R., ke ili, kiel kompenson, ricevos senpagan abonon. Mi opinias, ke ĉiu k.do donu sian obolon por nia ideala afero. Eĉ la Centra Komitato pagas sian abonon kaj kotizon.

Ŝparemo. La 15-an de novembro 1922 la poŝtarifoj en Germanio estas plialtigita je 100%, sekve ni ŝparu. Pro tio mi faras kelkajn konsilojn kaj petas la gek.dojn atenti ilin. Ĝis nun la germanoj sendis la monon por abono kaj kotizo al mia adreso kaj la aliĝilon al Paris, sekve dufoje elspezojn. Ĉu ne estas pli preferinde ĉion sendi al mia adreso kaj ĉar mi ofte interrilatas kun la Administracio mi povas enmeti la aliĝilojn. Tiun monon, kiun oni ŝparas per tio, oni povos fluigi al municio por S. R. Ofte mi ricevas kartojn aŭ leterojn, per kiuj oni demandas pri io ajn, mi ne respondas ilin, se ne afranko estas almetata aŭ, se la demando estas grava mi respondas per leterkesto.

*) Aperis en „*Sächsische Arbeiter-Zeitung*“ pseŭdo malkonfirmo de la intervjuo, kiun mi havis kun *Rakoŝi*. *D.ro Franz*, la direktoro de tiu organo, aldonis la jenon: „Ni rimarkigas, ke al K.do *Rakoŝi* nur estas antaŭmetitaj eltiraĵoj el tiu de ni publikigita intervjuo. Kial ne la tuta?“ Tre ĝusta estas la rimarko. Kiel la afero estis prezentata al R.? Spertinte la agmanierojn de iuj idistoj oni povas fari ĉiajn supozojn. Ili nepre volis ricevi iun ajn deklaron, kiun jezuitmaniere ili povos prezenti al neinformita publiko kiel malkonfirmon. Ne povas iel ajn okazi malkonfirmo de la dokumento, al mi liverita de R., kaj kiun mi havas en manoj. Per tiu nova intrigo la idistoj montras kion ili kapablas fari por trompi la publikon. Sed nur neinformituloj povas esti erarigataj per la teksto publikigita de idistoj. Eĉ ne necesas esti ekzegisto por ekvidi en la idista teksto signojn de mensogo. Ekzemple: Estas dirite, ke R. ne parolis pri *Itchner* (. . . „precipe pri K.do I. quin me ne enuncabis . . . “, en la ida teksto). Nu, kiu kredos, ke dum duonhora intervjuo pri *Studkomisiono*, kies sekretario estis I., *Rakoŝi* ne prononcis la nomon de l'sekretario?! Tion, sinjoroj idistoj, rakontu nur al malinteligentaj kredemuloj! Mi preferus scii en kies poŝojn falis la 150 sv. frankoj, kiujn I., laŭ lia letero (20. junio 1921), sendis(?) por aĉeti esp. dokumentojn.

Tre grava afero estas la gazetekspeĉado. Ĝi postulas multe da laboro kaj afranko. Ekz. en Dresden, Frankfurt, Wien k. a. mi sendas la gazetojn kolektive por ĉiu k.do en la koncernanta urbo. Per ĉi tiu manipulo ni ŝparas monon kaj tempon por skribi tiom da adresoj. Mi opinias, ke tio en aliaj urboj ankaŭ estas ebla. La elektita k.do nur bezonas sendi al mi liston de l'abonantoj en sia urbo kaj mi tuj agos. Multfoje la k.doj loĝas en unu strato, eĉ domo. — Kelkfoje gazetoj revenas, ĉar la k.doj forvojaĝis aŭ transloĝiĝis, pro tio mi petas tuj sciigi al mi la adresŝanĝon, ĉar mi ne pli frue ekspedas plu, ĝis kiam mi estos ricevinta la novan adreson. — Ĉiu grupo havigu al si provizon da tiuj broŝuroj, kiujn vendas S. A. T. Vidu la anoncojn pri tio en S. R. — Jarlibrojn ni nur ekspedas laŭ ordono de l' Administracio al la k.doj.

F. C. Richter

La Faktoj pravigas la vidpunkton de S. A. T.

Gēfle, 10. 9. 1922

Kamarado Lanty

„ . . . Jam vi skribis al mi pri la malneŭtraleco de la neŭtralaj Esp.istoj. Laŭ via propono mi parolis kun la redaktoro de „la Espero“. Kiam mi demandis lin kial oni neniam skribis pri Sennacieca Revuo kaj pri S. A. T. li respondis, ke li forpensis. Sed ankaŭ poste oni neniam raportis.

Krom tio, mi verkis svedlingve socialistajn broŝurojn pri mondlingvo. Pri ĉi tiaj broŝuroj „la Espero“ ne volis raportiri. Kelkaj laboristoj ankaŭ atakis la neneŭtralecon de la neŭtraluloj. Tial mi decidis organizi nin en laboristan ligan. Cetere la kotizo de la Sv. Esp. Fed. estas tro granda por laboristoj, tial multaj ne aniĝis al ia asocio. Ni do decidis provi per malgranda kotizo arigi ĉiujn esperantistojn interesulojn en unu asocion.

Per nia gazeteto, ni povas tre bone agiti inter la laboristoj kaj per ĝi ankaŭ vigligi novkomencantojn. Ni plie, kiel vi jam rimarkis, tre agitas por anigado al S. A. T. kaj por abono al S. R. . . .

. . . Kompreneble la burĝa asocio jam komencis kontraŭbatali nin ĉar ili ne volas, ke la laboristaj esperantistoj organiziĝu. Sed tamen ŝajnas ke ni jam havas influon super la svedaj esperantistoj. La plejmulto esperantiĝis per nia propagando. . . .“

Kun ruĝa saluto

Einar Adamson

redaktoro de Sveda laborista Esperantisto.

Al niaj Abonantoj

La pli granda parto de niaj abonantoj finiĝas en decembro. Ni do petas ke ĉiuj abonantoj kiuj estas informitaj pri la finiĝo de sia abono, bonvolu kiel eble plej baldaŭ sendi sian reabonon por eviti al si interrompon en la ekspedado de la Revuo, kaj al ni senutilajn klopodojn.

Atentu! vidi la novajn abonprezojn en la Informilo.

Diskutejo

Respondo al kamarado R. Guihéneuf

Mi plejparte konsentas pri la enhavo de la artikolo „Diskutindaj pripensoj“, sed rilate al la diroj pri „ido“, abismo min apartigas de kamarado G.

Ni lasu paroli la faktojn: Mi lernis esp.on en la siberia militkaptiteco kaj praktikadis ĝin tie kun rusaj, hinaj kaj japanaj proletarioj. Pri „ido“ mi en Siberio nenion aŭdis. Reveninte hejmen, mi legis en la gazetoj notetojn pri „ido“ kaj inter krampoj estis: „plibonigita kaj plisimpligita esp.o.“ Miregante, ĉu povu vere ekzisti idiomo, pli simpla ol nia esp.o, mi aĉetis idan lernolibron. Mi tute objekte kaj senpasie studadis la aferon kaj se mi ĝin estus trovinta pli facila aŭ pli simpla ol esp.o, mi tute sincere ĝin estus dirinta. Sed, kiel efektive estas, mi trovis, ke „ido“, kun ĝia amaso da esceptoj, multoble pli da pronomoj, afiksoj kaj sufiksoj, ofte tute superflua, estas terura komplikajo rilate al esp.o. Pri tio do, ke „ido“ estas multoble pli malfacila ol esp.o, ne povas esti eĉ ereto da dubo. Mi estas tute konvinkita, ke la plejmulto da personoj sinceraj, kiuj havas ioman gramatikan komprenon, ĝin certe konstatos per la komparo de idolernolibro kun esperantolernolibro.

Rilate nun al la scienca afero pri „ido“, estas 3 personoj, kiujn la idistoj konstante citas: Pfaundler en Graz, Ostwald, Jespersen en Kopenhago. La unua Pfaundler, mortis en la 1918a jaro. Tamen la idistoj lin citas tiel, kvazaŭ li vivus ankoraŭ. Ostwald dum la mondmilito propagandis la mondlingvon „Wede“ (plisimpligita germana lingvo). Se li do estas tiel konvinkita idisto, li do estus devinta rekomendi „idon“ kaj ne „Wede“. Restas do nur la sola Jespersen. Esp.o kontraŭe, estas parte aprobita, parte jam akceptita de multege da scienculoj aŭ sciencaj asocioj. Oni povas tute kviete diri, ke en la praktiko la scienco jam solvis la problemon kaj la grandega plimulto de scienculoj apogas esp.on. Pro manko de loko de nia revuo mi ne povas citi la amason da pruvdatoj. Oni nur pensu al la gravega rezolucio de la kongreso de internaciaj asocioj, okazinta en Bruxelles, Septembro 1920, kie 118 reprezentintoj de ĉiulandaj universitatoj kaj sciencaj asocioj de la tuta mondo invitas ĉiujn emulojn al la mondlingvomovado apogi esp.on, dirante, ke ĉiuj eventualaj ŝanĝoj devas esti prokrastataj, ĝis esp.o estos oficiale akceptita de ĉiuj registaroj de la mondo. Ankaŭ en la Ligo de Nacioj gravaj scienculoj kaj spertuloj antaŭ nelonge deklaris esp.on kiel plej simplan kaj plej rekomendindan inter ĉiuj mondlingvoprojektoj.

Nun al la idistoj mem. La konstanta publikigado de „plisimpligita kaj plibonigita esp.o“, estas tute nelojala faro. „Ido“ estas alia mondlingvo ol esp.o kaj se la idistoj estus sinceraj, ili devus nur propagandi sian lingvon sub la nomo de „ido“ sen la supra aldono. Anstataŭ tio ili altrude alroka sin al esp.o kaj estas fakto, ke ili nur al la konstanta misuzo de la nomo esp.o dankas sian vegetadon. Sen tio ili tute neatentite mortus. Krom tiu falsiga propagando la idistoj ĉe ni en Vieno kaj ĉefe en la komunistaro uzadis ĉiuspecajn malnoblajn artifikojn kaj mensogojn, ĝis kelkaj kamaradoj per ĝusta informo de la trompita komunistaj ĉefuloj kaj senlaca laborado sukcesis, ilin komplete forpeli el nia komunistarta partio.

Mi ne dubas pri tio, ke inter la idistoj estas ankaŭ bonaj, sinceraj personoj krom senskrupulaj intrigantoj kaj konsciaj trompantoj kaj mi ĉefe celas per miaj vortoj la lastajn kaj la sistemon idistan, la lingvon mem.

Mi konfesas, ankaŭ mi iafoje ekscitiĝis pro „ido“. Se tio okazas, kiel kamarado G. observas, se esp.aj proletarioj kolekte kontraŭstarigas ĉe la mencio de „ido“, tio, kamarado G. estu certigota, okazas nur pro la suprecititaj abomenaj faroj. La ĝisfunda indigno, la elkora bedaŭro, ke tiel nobla afero kiel la tutmonda kompreniĝo, la alproksimiĝo de la homaro, per tia faraĉo estas barata en ĝia glora progreso — jes tio, nur tiu sento estas, kiu al ni klaskonsciaj esp.oj pelas la ruĝon en la vizaĝon. Do ne ni, klaskonsciaj esperantistoj, kiel kamarado G. opinias, tiel malhelpas nian aferon, tute ne: La idistoj estas tiuj, kiuj ĉiuokaze malhelpas nian aferon, *konscie*, se ili estas trompuloj kaj *nekonscie*, se ili estas sinceraj.

Sekvas el la diritaĵo, ke ni tute decide, plej akre devas kontraŭbatali „idon“. Sed komprenu bone, kamaradoj, ni tion devas fari en la *taŭga* maniero, ne farante bruon. Oni buŝe intervenu ĉe gravaj personoj, influataj aŭ trompataj de idistoj kaj ĝuste informu ilin pri la vera stato de la mondlingvomovado, ne laciĝante, ĝis la afero estos ordigita. Se necese, oni ankaŭ

en idistaj kunvenoj senmaskigu malveraĵojn, ne timante por la kontraŭa okazo. En niaj kunvenoj, lertaj, bone informitaj esp-istoj facile neniiĝos la idistojn, ĉar ni havas ĉe nia flanko la etikon, la veron, la faktojn.

Ni, senkompromisaj esp-istoj, paŝas sur la ĝusta vojo. Ĉu "ido" estas simila al esp.o aŭ ne, tio estas por ni tute flankaj kaj indiferenta afero. "Ido" estas alia mondlingvo kaj nur unu unika mondlingvo povas helpi la mondproletariaron, ne du. La faktoj, la vivo, jam pri tio decidis kaj ĉiutage pli elokvente nin instruas, ke tiu lingvo estas esp.o. Ni do laboru celkonscie nur por ĝi. Ni kreu senduban, klaran situacion! For el niaj vicaj ĉian cedemon, ĉian ne ĝustan indulgon al "ido" kaj aliaj malvive naskitaj lingvoprojektoj! — Tio, kamarado G., ne estas "dogmeco", ĝi estas memkomprenebla defendo de nia afero, vera revolucio en mondlingva rilato!

Siegfried Feith



Nutrate per intrigo kaj blufado Ido baldaŭ mortos pro honto.

DIVERSAĴOJ

Interesa Propono

Ĉar multuj scivolos pri Rusio kaj estas ofte tute ne objektivaj informataj, k.do *Hermann Konovalov* (adreso: Teatralnaja pl. 6, 9, *Niĵnij-Novgorod*) proponas malfermon en la Revuo de rubriko en kiu la legantoj demandos, kaj la rusaj S.A.T.-anoj respondos. K.do Konovalov estas jam preta respondi demandojn.

Alvoko

En la komenco de Decembro okazos en Amsterdamo Intern. Kontraŭmilita Ekspozicio, kies gvidanto petis nian per esp.an helpon je la kolektado de ĉiuspecaj aĵoj rilatantaj al la kontraŭmilita movado.

Pro tio ni tre petas alsendon de *Esperantaj kaj nacilingvaj kontraŭmilitaj eldonaĵoj* (gazetoj, folietoj, bildoj, libroj, glumarkoj ktp.). Precipe el malpli proksimaj landoj. Gesamideanoj helpu nin. Ebligu al ni montri la praktikan valoron de esp.o.

Ni estas pretaj al reciproka servo. Sendu ĉion al
Ned. Laborista Esperanto Servo, Alleeweg 9, Eschede, Holland

Helpo al la malsatantoj en Ruslando

La sekcio: Poŝtmarkkolektado de la Nederlanda Ĝenerala Komitato por helpo al malsatanta Ruslando petis min kolekti poŝtmarkojn inter la Esperantistoj.

Pro tio mi petas ĉiujn, kiuj tiumaniere volos helpi al la malsatantoj sendi iliajn p. m. al mi. Ĉiuj specoj estos bonvenaj!

G. P. de Bruin, Alleeweg 9, Enschede (Holland)

P. S. Mi ne interŝanĝos! Represo kaj diskonigo petataj.

Esperanto en la praktiko

La *Intern. Labora Oficejo* havas esp.an fakon en sia inform-servo. El la diversaj sciigoj, tiele ricevitaj ni eltiras la jenan: „Komitato de la IIIa Kunveno de la *Ligo de Nacioj* decidis rekomendi voĉdonon de 3 000 000 sv. frankoj (ĉirkaŭ 120 000 funtoj sterlingaj) por konstrui daŭran hejmon por la *Int. Labora Oficejo*... La loko de la nova konstruaĵo estas la lagborda bieno prezentita tiacele de la *Svisa Federacia Konsilantaro*... Tiu-ĉi terpeco estas taksita je 1 200 000 fr... La planoj de tiu-ĉi oficejo estos elektataj per publika konkurso inter svisaj arkitektoj. Ĉiu ŝtato, membro de la I.L.O. estos invitata kunhelpi per sendo de plej bonaj konstrumaterialoj kaj artaj produktaĵoj. La japana delegito jam diris, ke li ne dubas, ke la Registaro kunhelpos al la ornamado en maniero inda tiel je Japanio kiel je I.L.O.“

Internacia Kongreso Anarkista

Okazos en Berlino de la 28a Januaro ĝis la 1a Februaro. Ĉiuj k. do estas petataj sciigi la Inicioran Komitaton pri eventuala partopreno.

Oni skribu al k.do *André Colomer*, 69 boulevard de Belleville, Paris.

Esperantistoj ne forgesu, ke la mondlingva demando staros en la tagordo.

Sciindaĵoj

Lastatempe internaciemaj katolikoj kongresis en *Luxemburgo*. El „Katolika Mondo“ ni ĉerpas la jenon: „... speciala Komisiono pritraktanta la problemon de internacia helplingvo energie postulis, ke esp.o en la kongresoj estonte estu uzata kiel unusola lingvo por traduko, tiamaniere, ke ĉiu parolu laŭvole en gepatra lingvo kaj ke oni nur traduku en esp.o...“ Tiucela deziresprimio estis akceptata.

*

La *Ligo de Nacioj* akceptis, la 21a Septembro 1922, la raporton de sia Ĝenerala Sekretariaro favoran al esp.o. Sed ĝi ne konsentis rekomendi la lingvon al la ŝtatoj. Kiel kompromiso inter simpatianoj, skeptikuloj kaj kontraŭuloj al esp.o estis decidite komisi la konstantan *Intelektan Komitaton*, kie sidas famuloj kiel la filozofo *Bergson*, la scienculo *Einstein* k. a., ke ĝi ekzamenu la demandon kaj donu sian opinion.

Estas malfacile scii, ĉu tiu decido estas enterigo de la afero aŭ envojigo al definitiva solvo.

La raporto estas almenaŭ bona propagandilo. Ĝi estas jam presita en la oktobra n.ro de „Esperanto“, organo de U.E.A.

*

U.I.K.S. (Unuiĝo Internacia de la Komunistoj Spiritualistaj). Unu el la celoj de tiu organizaĵo estas la disvastigo de esp.o. Oni petu informojn al s.ino *Wolff*, 8, rue Philibert-Lucot, Paris (VIII).

*

K.do *P. F. Cameron* ĉagrene sciigas, ke pro ŝanĝo en la Redakcio de „Daily Herald“, la arango jam decidita pri enpreso de informoj ricevitaj per esp.o ne povos efektiviĝi.

Oficiala Komunikajo de la Frankfurta Kongreskomitato

Post fina kontrolo de la kaslibroj, la kalkuloj de la 2a Kongreso saldiĝas per havo da 12 000 markoj germanaj.

En sia lasta kunveno la kongreskomitato decidis dividi tiun sumon poduone, t. e.: 6000 mk. al dispono de l' Centra Komitato de S.A.T., la ceteraj 6000 mk. al dispono de l' Kongreskomitato.

La K.K. proponas ke la C.K. allasu sian parton je la profito de la 3a Kongreskomitato.

La K.K. sian parton utiligas jene: subvencio da 2000 mk. por la 3a S.A.T.-kongreso, 1500 mk. por la Rusaj Malsatuloj, 1000 mk. por helpi al broŝurforma eldono de la parolado de k.do Prof. Ferdinand Szereny, 1000 mk. samcele pri la parolado de k.do Richard Mahn, 500 mk. por la propagando poresperanta en Frankfurt.

Por la Frankfurta Kongreskomitato:

27a oktobro 1922

Jean Roth (Prezidanto)

Rud. Meyer (Kasisto)

*

La Centra Komitato de S.A.T. unuanime aprobas la decidojn de la Kongreskomitato, kaj konfirmas tion ke, la 6000 markoj estos ĝirataj al kaso de la fondota komitato por la Tria Kongreso.

La Sekretario de S.A.T.

KRONIKO

Aŭstrio

Graz: En septembro okazis en la ligo de senregistaranoj (Komunistaj anarkiistoj) ekspozicio de esp.istaj verkoj, gazetoj kaj diversaj esp.ajoj. K.do Eder parolis pri la neceseco de esp.o por la anarkiistoj kaj s.ro Bartel pri la konstruo de esp.o. La 11a oktobro, k.do Eder komencis en urba lernejo kurson portopenata de 20 lernantoj, plejmulte anarkiistoj. Deziras ĉi-tiu esp.o-rondo "Libereco" por siaj letervesperoj korespondadon kun la tutmonda anarkiistaro pri: verkoj de niaj eminentaj teoriuloj: Tolstoj, Kropotkin, Ferrer, Landauer, Bakunin, Pierre Ramus k. a. esperantigitaj aŭ ne; anarkiistaj kolonioj, absoluta kontraŭmiliteco kaj revolucia batalo ktp. ktp. Vidu la adreson ĉe Korespondado."

Wien: La ĉi-tiea esp.a movado, precipe en la komunista laboristaro, konstante kaj rapide kreskas; la ĉeforgano: *Die Rote Fahne* (La Ruĝa Standardo) ĉiusemajne, marde, aperigas priesp.an artikolon kaj preskaŭ ĉiutage notojn. Ĉiunonate ni disvendas 100 ekz.ojn de S.R. en nia urbo. — D.ro E. P.

Bulgario

Sofia: Ankaŭ la organo de *Bulg. Kom. Partio* "Rabotničeski Vestnik" estis trafita de "oficiala" sciigo pri rekomendo de ido, kiel helplingvo por la *Komintern*. Felice, ke ni jam estis informitaj per S.R., ke tiu informo estas nur ega mensogo. Ni tuj protestis. La 16a septembro la Redakcio, konstatinte, ke de ĉiuj flankoj alvenis protestleteroj de esp.istoj, sciigis, ke peto estas jam sendita al la Kom.a Partio, ke ĝi klopodu por akiri aŭtentikan sciigon. La gvidata dum tri monatoj kurso finiĝis bonsukcese. — P.K.

Germanio

Dresden (kaj distrikto Gr.-Dresden): Okazas 18 kursoj kun pr. 700 parteprenantoj. Kursejoj estas lernejoj ĉambroj en diversaj kvartaloj. Propagando komencis tuj post la 11a Satkongreso. Disdonitaj 10000 flugfolioj pere de la sindikatoj, 20000 parte disdonitaj pere de la membroj, parte agluitaj je muroj, domoj ktp. En la plej grandaj fabrikoj ni elpendigis apartajn varbilojn, en kelkaj butikoj kaj kooperativaj vendejoj ni elpendigis plakatojn. Plakatoj estis plue portataj tra la stratoj. Bone vizitata propagandkunveno kun ekspozicio okazis. Idistoj ĉeestis. Iliaj klopodoj estis vanaj. Per aperigo de notoj kaj artikoloj pri la 11a Satkongreso kaj pri esp.o ĝenerale en la ĉi tiea labor. gazetaro la laboristaro dum la lasta duonjaro daŭre estis atentigata al nia afero. — Por la tuta distrikto ni eldonis 30000 foliojn komunajn de 5 labor. esp.aj grupoj. En Heidenau (industria vilaĝego) 2 kursoj, en Sebnitz i. Sa. (florindustrio) 1 kurso, en Zitzschewig (nove fondiĝinta nura Sat-grupo) 1 kurso. — J. G.

Köln: La 10a oktobro okazis kunveno de la liberemaj esp.istoj, dum kiu estis debatataj la statutoj por fondo de *Unuiĝo de Liberemaj Esp.istoj, Köln*. La teksto proponata de komitato estis akceptata, escepte la artikolo pri nepra aparteco de la membroj rilate al t. n. neŭtrala esp.a grupo.

Estis decidite organizi por la 10a decembro publikan feston, kiun estus dezirinde, ke ĉeestu eksterlanda k.do.

Sciinde ankaŭ estas por la S.A.T.anaro, ke ĉi-tie k.doj estis vizitataj de persono, kiu volis esploraĉi la okazintaĵojn de nia 11a Kongreso kaj la karakteron de S.A.T. Tiu fihomo, diris al iu k.do, ke li povus gajni grandan sumon da mono, se li volus informi pri la S.A.T.-afero. — Petersen.

Gröba-Riesa. La ĉi tiea esp.-grupo malfermis kurson por komencantoj je la 11a oktobro 1922 kun 47 partoprenantoj. Tiu nombro altiĝis je 60 personoj. Ĉi tio signifas, ke ankaŭ en nia loko la esp. movado pli kaj pli disvastiĝas. Por perfektigantoj ankaŭ funkcias kurso. Ambaŭ okazas marde kaj merkrede en la popoldomo.

Witte

Italio

Milano: Ĝus organiziĝis en Milano "Proletaria Esperantista Grupo" (adreso: Via Mancini 15), celanta samtempe porvarban kaj porpraktikan agadon inter la klasbatalantaj proletarioj. Ĝi decidis malfermi kursojn por la instruado de esp.o al la gelaboristoj, kaj starigi esp.an bibliotekon por siaj anoj: tial ĝi estos tre danka al la gekamaradoj, kiuj bonvolos donaci al ĝi novajn aŭ jam uzitajn esp.ajn librojn kaj ĵurnalojn. — D.ro D. C.

Norvegio

Kiel antaŭe informita la koresponda lernejo de la *Norvega Laborista Partio* akceptis esp.on kiel instruobjekton. Tiamaniere nun tiu partio propagandas nian lingvon en la plej gravaj laboristaj gazetoj. Komitato de "S.A.T.anoj" verkis instruajn leterojn kaj korektas la taskojn de la lernantoj. Por sia laboro la komitato eĉ estas pagata.

Ĉe debata societo "S.A.T.ano" faris prop. paroladon. Sekvis tre interesa diskutado favora al esp.o.

Ĉe junula societo de komercoficistoj k.do faris paroladon pri nia 11a Kongreso. Rezulto: nova kurso. — Reaperanto!

Svedio

Falun: K.do V. Bonde instruas al 32 lernantoj.

Jönköping: Senlaboruloj estas instruataj pri esp.o de k.doj Einar Lundin kaj Klas Hultkvist.

Kramfors: Kurso gvidata de k.do J. Lindholm, 20 partoprenantoj.

Ludvika: Kurso kun 20 lern. gvidata de B. Eriksson.

Väja: 12 lern. sekvas kurson de k.do J. Lindholm.

Vansbro: Kurso gvidata de k.do E. Blomqvist.



RECENZEJO

Duope ricevitajn verkojn ni recenzas, unuope ricevitajn ni nur mencias.

Libroj

Lettres sur la vie (Leteroj pri la vivo) de *Valée du Mont-Ari*. Eldonis E. Monier à Châtenay-Malabry (Seine, Francio). Formato: 11½ × 19 cm. 292 pĝ. Prezo: 5.50 fr. fr.

Jen beleta kaj alloga titolo! Image oni sin vidas rajdanta. Pegazon kaj ... antaŭen al Muslando! ... Bedaŭrinde oni trafas nur en sciencan kaj sociologian filozofion. Multaj paĝoj estos necesaj por analizi tiun verkon, se oni volus tion fari tiel koscience kiel verkis la aŭtoro!

Voltaire skribis: „Se Dio ne ekzistus, lin oni devus imagi.“ Centjaron pli poste M. Bakunin respondis: „se ekzistus Dio ni devus lin formalaperigi.“ La originala diro de Bakunin estas multfoje pli elokventa ol la tuta, tiu leterforme verkita libro.

Kun fiera braveco S.ro V. du M. A. atakas la sciencan kaj la scienculojn oficialajn pro ilia dogmeco, sed li mem asertas hipotezojn nuntempe nepruveblaj, kaj li nomas ilin „eternaj veroj“! Pri arto kaj muziko la aŭtoro eldiras ege sensencajn paradoksojn, kiajn similajn nur skribis Tolstoj!

Tiu libro povas efiki al la antaŭenemaj medioj kaj al ne sufiĉe kulturitaj cerboj tiom malbone kiom bone. En la socialistaj kaj anarkistaj rondoj estas multe da ŝajnaj kleruloj, kiuj asertas *ex cathedra* aferojn, de ili ne konataj!

Tamen ti-kiuj ne kutimas vante babilaĉi, kiel okazas tro ofte ĉe sciencemaj anarkistoj, povos profite legi tiun libron, kun pasio verkita de bonkorulo, kuraĝulo kaj sincerulo.

P. Larivière.

Le Bolchevisme (La Bolŝevismo) de Vera Starkoff, kun antaŭparolo de Han Ryner. Eldonejo: *Le Fauconnier*, 74 rue de Vasco de Gama Paris (XV) Formato: 12 × 18 cm. 68 pĝ. Prezo: 3.50 fr. fr.

„Ĉiama temo en ĝia nuntempa aspekto“, diras H. R. en l'antaŭparolo de tiu francalingva verketo. Tion mi nur emus ripeti pri la en tiu libreto preparolita temo.

Ĉu bona aŭ malbona estas la perforto? Malbona, diras Vera Starkoff, kiu mallaudas la bolŝevisman regadon. Se oni konsideras la aferon en si mem, kompreneble oni konsentos kun la verkintino. Sed atentinda estas ankaŭ la demando de iu ruĝarmeano: Ĉu efikus revolucia senperforto kontraŭ la kontraŭ-revolucia perforto? Jes ja, ĉiama temo.

Almenaŭ la aŭtoro, tolstoĵanino, aprobas senrezerve la grandan leĝon proklamitan de la bolŝevistoj: *Kiu ne laboras tiu ne manĝu*. Gojege ni, *laborantoj*, aŭskultas pri la ekzempla manlaboro de Tolstoj. Manlaboro ja devus esti ĉies devo. Estas historie konstatebla fakto, ke ofte la t. n. intelektuloj faris plej egajn malbonaĵojn kaj maltrafaĵojn. Venu do la tempo kiam oni gloros la *laborantecon* kaj ne plu parolos pri aĉa *laboristeco*. Pensiga estas la verko de V. S. kaj plej rekomandinda al ŝcipovantaj la francan lingvon.

R. Guilhèneuf

Ekzilo de *Aleksy Rzewsky*, el la pola lingvo esperantigita de K. Domolawski, eldonita de *Laborista Librejo*, Adreso: Warszawa, Wspolna 17. Formato: 13×17 cm. 60 pĝ. Prezo aŭfranke: 0.50 svisa fr.

Niaj legantoj jam konas K. don Domolawski per liaj interesaj artikoloj publikigitaj en S. R. La traduko de la „Rememoroj“ de Rzewski estas certe bona. Ni povas do senhezite konsili la legadon de tiu broŝuro.

La plej granda Komunista organizaĵo en la mondo (La komunumo de la duhoboroj) de M. I. Tugan Baranovskij, verkita en 1918 kaj esperantigita el la rusa de Maria Sidlovskaja. Eldonis: „Biblioteko de Teristo“, Moskvo poŝtkesto 663 al Stanislaw Szabuniewicz. Formato: 13×17 cm. 48 pĝ. Prezo nemontrita.

Urboj de la estonto. Eltirajo el la libro de Dadonov: „Ĝardenurboj de la estonto — nun — tempe“. Sama eldonejo kiel supre. Formato: 13×17 cm. 16 pĝ. Prezo nemontrita.

Gazetoj

La Interligilo de i'P. T. T., organo de la Unueca Poŝta Federacio de Francio. (n.o 1) Monata. Formato: 22½×28½ cm. 4 pĝ. Jarabono: prezoj diversaj laŭ la landoj, senpaga por ĉiuj regulaj korespondantoj. Adreso: 54 rue Custine Paris (XVIII).

La eldono de tiu fakorgano estas rezulto de senlaca propagando de nia k. do *Petro Filiâtre*, ĉe liaj samfakanoj. Per esp. o li havigis valorajn informojn pri la vivkondiĉoj de poŝtistoj en diversaj landoj, kaj tiele sukcesis altiri simpatian al esp. o kaj fine varbi la estraron de la Franca Poŝta Federacio, kiu komisiis lin zorgi pri eldono de la ĉi-supre nomita organo.

Tiu rezultajo plej trafe montras, ke la porpraktika laborometodo, konsilata de S. A. T., estas ankaŭ resalte tre varbpova.

Plej sinceran sukceson ni deziras al tiu nova kunfrato.

Esperantista Junularo. La dumonata revueto, kiun jam de du jaroj eldonas nia k. do A. Robin. (Adreso: Beaugé, Maine-et-Loire, Francio) aliformatigis kaj nun aperas okpage kun plaĉa ruĝa kovrilo. Tiu porjunulara organo estas tre rekomendinda. Jarabono: 8 respondkuponoj.

Pola Esperantisto. Monata organo de Polaj Esperantistoj. Formato: 16×24 cm. 16 pĝ. Adreso: Warszawa str. Królewska 19. Naciema gazeto redaktata en esp. o kaj en pola lingvo.

Memoroto. — 1) *Gazetoj tute en esp. o*: La Nova Epoko (2, 3), Literaturo (15), Esp. Tiumfonta (105, 106, 107, 108), Katolika Mondo (3, 4), Hispana Esp.isto (59), Kristana Espero (4) Vegetarano (1), Verda Utopio (7-8-9), Hungara Esp.isto (10), Konkordo (4-5-6), Progreso (8).

2) *Dulingvaj*: Esperanto-Praktiko (9, 10), La Revuo Orienta (9), L'Esperanto (10), Sveda Laborista Esp.isto (3), Marto (10), Kataluna Esp.isto (8-9), Germana Esp.isto (10), The British Esp.ist (211), La Vero (7), France-Esp. o (10), Der Arbeiter-Esp.ist (10), Esperanto-Film (3-4).

3) *Enhavantaj tradukaĵojn el S. R.*: La Bataille (24, Letero el Estonio; 35 El la nacie liberigita Ĉeĥosl.), Le Libertaire (197, Tutmonda Asocio por scienca anarkisma biblioteko) New-Yorker Volkszeitung (38, R. Rolland al la Sennaciularo), (Volkszeitung (230, Postsignoj de la milito), Volksblatt (215, R. Rolland al la Sennaciularo), De Tribune (23, Edukado en ruĝarmeoj), Rudé Právo Večerník (231, Edukado en ruĝarmeoj) Vorwärts, Reichenberg (247), A Batalha (1.146, 1.171), Volksblatt (198), Sächsische Arbeiter-Zeitung (246) En ĉi-lastaj gazetoj estas ĉu raportoj pri la S. A. T.-Kongreso, ĉu priesp.aj artikoloj en kiuj S. R. estas menciata.

4) *Enhavantaj priesp. artikolojn*: Newyorker Volkszeitung (235, 239), Svoboda (120) Rudé Právo (228, 245), Le Travailleur d'Eure-et-Loire (463), La vie d'outre Tombe (13) L'Ecole Emancipée (2, 4), Nova Sociedade (9), Norsk Bokbinder Tidende (18), The Plebs (10, 11), Ukrainskij Golos (38) Le Libéré (78), ampleksa kaj bona artikolo de P. Larivière.

Vortoj ne troveblaj en Universala Vortaro, sed oficialigitaj de la Akademio⁽¹⁾

(Daŭrigo)

E

ebri' ebur' Eden' edikt' efekt' efemer' egid' egoism' egoist' eklog' eklezi' eklips' ekip' ekonomi' eksces' ekskluziv' ekskomunik' ekskrement' eksperiment' ekspluat' eksport' ekspres' ekstaz' ekstrakt' ekvaci' ekvator' ekvilibr' ekzem' elegant' elegi' elektr' element' elf' eliksir' elips' elizi' emancip' emblem' emfaz' eminenc' eminent' emoci' emulsi' enciklopedi' endivi' energi' enket' entomologi' epidemi' epiderm' Epifani' epigraf' epigram'

epilepsi' epilog' epitet' epizod' epope' erik' erizipel' erotik' erudici' erupci' eskort' estetik' estrad' etik' etiket' etimologi' etiologi' etnografi' Eŭkarist' eŭnuk' evangeli' eventual' evident' evolu' evoluci' ezofag'

F

fakir' faksimil' fakt' faktor' fakultat' falang' familiar' fanatik' fanfar' fanfaron' fantazi' farmaci' fars' fasad' fatal' faz' fazeol' federaci' felieton' feminism' feminist' feniks' fenomen' fer' feston' fetiĉ'

feŭd' fi' fiakr' fiask' fiks' fiktiv' filantrop' filantropi' fili' filolog' filozof' filozofi' financ' fisk' fizik' fiziologi' fizionomi' fjord' flagr' fleksi' floren' flustr' fonograf' formal' format' formul' forum' fotograf' frakci' frank' fraz' fregat' fresk' fris' frit' frivol' fronton' fuk' funkci' furi' furor'

G

galant' galer' galop' gangli' gangren' gardeni' garn' garnitur' garnison' garol' gaz'

gem' genealogi' general' geni' geodezi' geografi' geolog' geologi' geometri' gerani' gerund' gigant' gilotin' gimnastik' gimnazi' girland' gladiator' glas' glazur' glicerin' gliceriz' glikoz' gnom' gondol' goril' gotik' grafit' grafologi' gram' grandioz' grimp' grip' grog' grotesk' grumbl' guberni' gulden' gutaperk'

Ĝ

ĝendarm' ĝeneral'

H

halebard' hamak' harem' harmoni' harmonik' harmonium' harpi' harpun' hazard' he (interj.)

1) Vidi la septembran kaj novembran n.ojn.

(Daŭrigota)

Lingvaj Demandoj

PRI INSTRUADO DE ESPERANTO

Ĝis nun oni instruis Esperanton laŭ la metodoj uzataj por instrui naciajn fremdajn lingvojn, t.e. laŭ la «senpera metodo», kiu celas doni la konojn necesajn por praktike uzi la lingvon, aŭ la «klasika metodo», kiu instruas la lingvon ĉefe je la literatura vidpunkto.

Sed oni ne pensis ke Esperanto — pro ĝiaj specialaj ecoj, t.e. logikeco kaj simpleco, kiuj tiel grave apartigas ĝin el la aliaj ekzistantaj lingvoj — povas esti instruata laŭ tre malsimila metodo; kaj oni ne klopodis trovi tian metodon.

La rezultato estas, ke post kiam oni diris al la lernantoj por allogi ilin ke Esperanto estas rimarkinde facile lernebla lingvo; ke, pro tio, ĝi estas tute aparta lingvo, ili miras vidi, ke la instruata metodo de tiu lingvo tute similas la aliajn; sekve ili estas, de la komenco, seniluziigataj, kaj perdas rapide la intereson, kiun la dirita anonco naskis.

Tiu sento estas ankoraŭ pli akra ĉe la plenaĝuloj, kiuj provas lerni la lingvon kaj evidente renkontas pli grandajn malfacilaĵojn ol la infanoj, rilate al tiuspecaj studoj.

Oni sendube ricevas tute malajn rezultatojn se oni uzas metodon, kiu, de la komenco, vidigus al la lernantoj la ĉefajn ecojn de Esperanto, donus pli rapide konstateblajn rezultatojn, kaj unuvorte ebligus tiujn lernantojn konsenti, ke tiu lingvo estas, kiel oni diris, escepta lingvo.

Certe tiu demando devas esti zorge studata; ni nur donos tie ĉi kelkajn ideojn por precizigi nian proponon.

Unu el la plej karakterizaj ecoj de Esperanto estas *ĝia komprenebleco je la unua legado, nur uzante vortareton*. Ĝi estas la sola lingvo, kiu posedas tian econ; ĉu esti kapabla, post unu horo de laboro, legi iun ajn esperantan tekston ne estus rezultato alte taksata de la lernantoj?

Ĉu per la legado oni ne povus montri iom post iom la diversajn formojn kaj regulojn de la gramatiko, kaj de la vortaro? Ĉu ne estas eble konstrui tutan novan metodon de instruado, uzante legadon?

Ekzemple oni poste montros al la lernanto manieron redakti mallongan leteron, retradukante esperanten kelkajn partojn de la legitaj tekstoj, kaj uzante vortaron. Unuvorte, oni donos al tiu lernanto sufiĉe da sciigoj pri la lingvo por ke, se ĝi forigas la kurson post mallonga tempo, tamen *ĝi konservu unue konvinkon pri la facileco kaj taŭgeco de Esperanto, due eblecon legi kaj skribi facilajn kaj praktikajn tekstojn de tiu lingvo*.

Aliparte tiu metodo ne malhelpos, ke la lernantoj, kiuj dezirus fariĝi veraj esperantistoj, daŭrigu la studon de la literaturo.

Se oni akceptus tiun farmanieron, estus necese publikigi specialajn lernolibrojn, ĉar tiuj, kiuj ekzistas, tute ne taŭgas; aliparte estos ankaŭ necese instrui profesorojn, kiuj ĝis nun ne uzis tiun metodon. **ROLLET DE L'ISLE.**

El la "Bulteno de la Franca Societo por propagando de Esperanto".

Por Komencantoj.

LA NAZTUKO.

Estas malvarme. Neĝo kaj pluvo intermiksiĝas en la aero. Mi staras antaŭ vendejo, pripensas kaj kalkulas, kalkulas kaj pripensas, ĉu mi povas aĉeti hodiaŭ, aŭ ĉu mi ankoraŭ devas atendi. La prezoj pli altiĝas ĉiutage, sed ne la salajro. Mia pensado estas ĝenata per infana bruoj. Proksime de mi staras du malgrandaj infanoj kun tre aĉaj vestaĵoj. Vestaĵo oni preskaŭ ne povas nomi tiajn ĉifonojn. La plimalgrandulo krias: „Mi volas eniri, mi volas eniri!“ kaj li ploreĝas, kaj sur lia malgranda vizaĝo gluiĝas dika malpuraĵo. Antaŭ li staras la pligrandulo, ŝanĝe levante la gambojn piedbatante la pavimon. Li volas trankviligi sian fraton, sed ne sukcesas. Kontraŭe, la malgrandulo ĉiam pli furioziĝas. Sinjorino iras al la du knaboj kaj demandas: „Kion volas la malgrandulo?“ — „Fritz volas iri en la ĉambron,“ diris la pligrandulo. „Kial vi ne iras al la patrino kun li?“ — „La patrino ja laboras, kaj ni ne havas ŝlosilon.“ — Purigu la nazon de via frato kaj promenu, aliel vi eble malsaniĝos.“ — „Ni ne havas naztukon.“ — Koncize prenas la sinjorino la bluan antaŭtukon kaj purigas la vizaĝon de la malgrandulo. Li eble rimarkis, ke estas bona mano, malgraŭ la malglata antaŭtuko, li trankviliĝas.

Mi decidis, ne aĉeti. Mi venas al la ĉefstrato. Antaŭ mi iretas sinjorino en ledflava mantelo kun nigraj silkaj pasamentoj kaj sama ĉapelo kun valora ardea plumo. Super la altaj flavaj ŝuoj kun nigraj lakfolioj briletas la silkaj ŝtrumpoj. La sinjorino ne iras sole. Apud ŝi kuretas, kvazaŭ pripensante kaj konvinkite pri la neceso de sia ekzisto, sinjoro hundeto, vestita per malhela blua mantelo kaj pantaloneto. Je la dekstra flanko en la poŝo li portas — silkan naztukon.

Tradukita el la „Saksa Laborista Gazeto“ de Heidido (14 jara)

„Krom tio ne forgesu, ke la perfektigado de lingvo arta estas ebla ĝis senfineco, ĉar ĉiun bonan regulon, bonan formon, bonan esprimon, kiu ekzistas en kiu ajn lingvo, lingvo arta havas plenan rajton aligi al si, ĉian mankon, kiu povus troviĝi en ĝi, ĝi havas la rajton plibonigi kaj ŝanĝi, dum en lingvo natura pri nenio simila povas esti parolo, ĉar tiam lingvo natura transformiĝas jam en artan. (Fundamenta Krestomatio.)

* * *

Lingvo naskiĝas, vivas, kreskas, deformiĝas kaj mortas same kiel homo. Ĝi estas fiksiĝita kaj rigida nur kiam ĝi estas mortinta.

Abato Jean Rousselot
profesoro pri fonetiko ĉe "Collège de France"
(Francia Kolegio)

„En Esperanto estas 1^a, nur unu stila regulo: skribi plej klare; kio estas klara, tio povas esti nekorekta, sed neniam malbona; 2^a, unu malpermeso: skribi malklare; kio ne estas klara, tio povas iafaje esti korekta, sed neniam bona.“

TH. CART

Sennacieca Asocio Tutmonda

23 Rue Boyer, Paris-XX^e

OFICIALA INFORMILO

Celo: Utiligi praktike la internacian lingvon Esperanto, por la klasaj celoj de la laboristaro tutmonda (vidi la Statuton).

Jarkotizo: Minimume, valoro de unuhora laborsalajro por Membro aktiva, aspiranta aŭ subtenanta (individuo); minimume, valoro de kvarhora laborsalajro por Membro-organizaĵo; kotizo laŭvola, nedeviga por Membro-Aprobanto.

Jarabono al Sennacieca Revuo: 3 $\frac{1}{2}$ -oble la kotizon por aktiva membro.

Membreco kun abono: Specialaj prezoj (vidi sube).

Prezoi en nacia mono de la kotizo kaj de la abono: (La unua cifero indikas la minimuman jarkotizon por membro aktiva, aŭ aspiranta, aŭ subtenanta-individuo; la dua cifero la minimuman jarkotizon por subtenanta organizaĵo; la tria la jarabonon al Sennacieca Revuo sen membreco; la kvara la prezon de membra-abono por aktiva, aŭ aspiranta membro. Ne ekzistas da favoraj abonprezoj por la subtenantaj membroj (individuo aŭ organizaĵo).

Anglio: 17, 68, 60, 68 pencoj; Aŭstrio: 1600, 6400, 5600, 6400 kr. a.; Belgio: 2.50, 10, 9, 10 fr. b.; Bulgario: 15, 60, 50, 60 lev.; Ĉeĥoslovakio: 7, 28, 25, 28 kr. ĉ.; Danio: 1.70, 6.80, 6, 6.80 kr. d.; Finnlando kaj Baltaj Landoj: 8.50, 34, 30, 34 mk. f.; Francio: 2.50, 10, 9, 10 fr. fr.; Germanio: 100, 400, 350, 400 mk. g.; Hispanio: 2, 8, 7, 8 pes.; Hungario: 100, 400, 350, 400 kr. h.; Italio: 3.40, 13.60, 12, 13.60 lir.; Japanio: (samkiom en Anglio); Jugoslavio: (samkiom en Ĉeĥoslovakio); Nederlando: 0.85, 3.40, 3, 3.40 guld.; Norvegio: 1.70, 6.80, 6, 6.80 kr. n.; Polio: 400, 1600, 1500, 1600 mk. p.; Rumanio: 15, 60, 50, 60 lev.; Svedio: 1.70, 6.80, 6, 6.80 kr. sv.; Svisio: 1.70, 6.80, 6, 6.80 fr. sv.; Usono: 35, 140, 125, 140 cend.

La landoj, kies monkurzo estas malfavora rilate al franca franko, pagu prefere per naciaj monbiletoj en registritaj leteroj; la aliaj landoj laŭvole: per monbiletoj, poŝtmandatoj, bankĉekoj ktp. (tiuj-ĉi estu trateblaj en iu Paris'a banko).

La germanianoj (nur ili) sendu sian monon al nia agento en Leipzig: K.do F. C. Richter, Sommerfelder Str. 44 — poŝtĉeko n.ro 45170; la alilandanoj al ni mem en Paris.

*

Situacio de la membraro. Oktobro estis pli fruktodona ol septembro: 168 novaj S.A.T.anoj. Post tiu paŝego la membraro nombras 1664.

La amika konkurado inter Wien kaj Leipzig finiĝis per la venko de la unua; 138 kaj 104 membroj. Ĉu tiun superecon konservos longtempe niaj Wien'aj k.doj? — tion ni dubas, kaj ni avertas ilin (ho, tre sekrete!!) ke tiu situacio ne plaĉas al niaj Leipzig'anoj, kaj tiklas ilian jaluzemon; anstataŭ ilin silentigi tiu malvenko ilin plikreskigas, kaj ni scias ke ili preparas metodon kaj vastan varbadon por ree konkiri la unuan rangon. Vin mem gardu Wien'anoj!! Varbu, varbu!! — Ni observos tiun pacan batalon kies rezultato estos iel ajn profita al nia afero. Kiu el ambaŭ fine ĉefos? ... ni ne profetu, ĉar eble venos tria konkuranto kiu preterpaŝos la du unuajn. Kial ne?

Dume, niaj alijurbaj pioniroj ne dormas. Kompreneble ĉiuj urboj ne pretendas je tiom da S.A.T.anoj kiom en Wien, tamen en la proksima jarlibro multaj estos la urboj havantaj pli ol 20 membroj.

Dum oktobro ni enregistris 10 novajn membrojn de Markranstätt apud Leipzig, 4 en Düsseldorf, Budapeŝt 2, Glasgow 1, Milano 3, Buenos Aires 2, Pestozentlorinez 2, Varsovio 2, Berlino 1, Mannheim 5, Lodz 1, Marsejlo 2, Tallin 1, Moskvo 3, Salzburg 14, Stuttgart 2, Chemnitz 6, Breslau 6, Timiŝoara 2, Gladbeck 3, Astrahan 1, Petrograd 1, Bialistock 1, Linz 1, Cassel 9, Riesa 2. La propagando de la Dresden'aj k.doj influis sur la

apudajn urbojn: Zitzschewig, Coswig, Naundorf ktp., rezulte: 19 adeptoj.

Novaj fokusoĵoj en Trzyniec (adreso: k.do Mrozek, Karol, Trzyniec 210, Ĉeĥoslovakio), 11 membroj, en Kiev, Caricin, Ĉardĵuj, Efimovskaja (Rusio), Rivarolo (Italio), Praust (Danzig), Guesmain (Francio), Königsberg (Germ.), Madrid, Nova Bavaria (Rusio), Maggiora (Italio) ktp.

Direkta Komitato. La S.A.T.anoj de Nürnberg prezentas k.don Deubler, Konrad (Arcisstr. 48 II, 2, München, Germanio) kiel kandidaton por la 2a sektoro.

Kun k.do Goldstein (Dresden) por la 4a sektoro jen do du kandidatoj. Tio estas malmulte por la tuta sektoraro. Ni ree plendas pro la malatento de la membraro pri tiu demando kies graveco estas ĉefa por la estonto de S.A.T. Estus strange se ne troviĝos en ĉiu sektoro almenaŭ unu membro kiu kapablas plenumi la taskon de komitato; tio ne estas, la kompetentuloj kaj bonvoluloj ne mankas. *Ili sin deklaru senprokraste.*

La 3a kongreso. Male al nia espero ni ne ankoraŭ scias kie okazos nia 3a. Ĉu mankas da invitoj? ho, ne! Ni eĉ preskaŭ plendas pro ties multeco kiu malsimpligas la problemon. Ja, ĵus nin trafis plia invito, de niaj k.doj en Cassel (Germanio)!!

Tamen, spite la malrapideco de la poŝtaj rilatoj (aparte kun Polio kaj Aŭstrio) ni, verŝajne antaŭ la apero de tiu ĉi n.ro, scios kiu, el Cassel, Dresden, Linz, Varsovio aŭ Wien, estos la kongresurbo. Ĉiaokaze ni informos la membraron plej frutempe.

Kotizo. Ĉar baldaŭ venos tempo repagi la kotizojn, ŝajnas utila doni kelkajn konsilojn al niaj perantoj kiuj kolektos la kotizojn en sia urbo.

1. Apliki la plej datfreŝan tarifon,
2. citi la nomon kaj kompletan adreson de ĉiu k.do; la profesion kaj la politikan nuancon,
3. citi la membro-matrikulon de la malnovaj anoj,
4. menciĝi ĉu la membro estas aktiva, aspiranta aŭ subtenanta,
5. menciĝi ĉu la membro abonas samtempe al Sennacieca Revuo,
6. menciĝi la monon kiun pagis ĉiu k.do,
7. citi la malnovajn membrojn kiuj ne repagis,
8. la kurzusferantaj landoj sendu la papermonon en registrita letero (vidi detalojn supre).

Se niaj kolektantoj sekvos tiujn instrukciojn, la laboro de la Sekretario estos tre faciligata. Dankon antaŭe.

*

Avizo al niaj rusiaj kamaradoj. Ĉar tre malfacilaj estas la rilatoj poŝtaj inter Rusio kaj iuj okcidentaj landoj, aŭ inverse, kaj ĉefe ĉar tre riskhava estas la transsendo de mono, tial ni kun la Administracio de "La Nova Epoko" interkonsentis pri reciproka servo. Laŭ la kondiĉoj de tiu kontrakto, "La Nova Epoko" (1a Tverskaja-Jamskaja 35, lĝ. 5, Moskvo) kolektos la abonojn al Sennacieca Revuo kaj la kotizojn al S.A.T., de la rusiaj k.doj. — Same S.A.T. ricevos la abonojn al "La Nova Epoko" de la landoj kies poŝtilatoj kun Rusio estas nenormalaj, Dank' al tiu komuna monkonto, la 2 administracioj bezonos nur interŝanĝi la adresojn de la abonantoj.

*

Listo de la aliĝintoj al 2a kongreso

(Daŭrigo kaj fino)

Pro diversspecaj kaŭzoj ni ĝisnune ne povis publikigi la lastan liston de la kongres-aliĝintoj, kaj eĉ en tiu ĉi n.ro la amplekso de la aliaj rubrikoj ne ebligas menciĝi la adreson de ĉiu k.do. Cetere la nomo kaj la urbo sufiĉas, niaopinie, por pruvi la aŭtentikecon de la listo.

En la aŭgust-septembra n.ro la nomenklaturon haltis je la matrikulo 151; ĉi sekvas la 144 ceteraj. Do, entute: 295 kongres-aliĝintoj el 20 nacioj.

K.doj: O. Grimm, O. Beuthenmüller, W. Schlosser (Stuttgart), Joh. Herder (Klettitz), Kurt Locher (Cassel), Paul Lang (Schweinfurt), Sydney Smith (London), k.inoj Jung, Voillequin, Gauthier, Dordé, Lauscerrois, k.do Dordé (Troyes), gek.doj Vercruyse (Villepart), Forejh (Doubravka), Kraus (Doi Lukavia), J. Sveŝtka, Sedlak (Pilzen), K. Schwabenthal (Frankfurt), J. Szabo (Oradia-Mare), J. K. Götz (Frankfurt), F. Szerenyi, Kino Aglaja (Uzlorod), Mariano Rosa, Adelino Rosa (Cubo), E. Borš, L. Naray (Kispeŝt), David Sheriff (Glasgow), H. Fulda (Frankfurt), Petersen (Cöln), O. Müller (Leipzig), Paatz, Mägerle, Kienzle (Stuttgart), Lucas (Bad Homburg), Arne Setter (Kristiania), G. Thamm (Landeshut),

H. Sauer (Frankfurt), H. Simon (Nürnberg), H. Borrmann, F. Röbig (Frankfurt), P. Gottgetreu (Hannover), F. Müller (Bochum), José Borrell, Salvador Gúma, V. Llobregat, Brig Camps Semo, Sender Miquel (Barcelona), gek.doj Coldefy, gek.doj Migny (Paris), J. Batta (Prešov), A. Jäckel (Cassel), E. Wendler, E. Grau (Leipzig), L. Herz (Budapest), gek.doj Döring (Freiburg), G. Mahn (Berlin), Karl Barthel, Bonte (Frankfurt), Fritz Zschech (Mainz), F. Schindler (Düsseldorf), A. Dix, W. Seifert, W. Schaaf (Leipzig), J. Rousseau (Paris), R. Reussner (Cassel), E. Reichel, G. Heil, W. Eberhardh, H. Wagner, A. Staubli (Frankfurt), R. Storch, k.ino Doleschal (Dresden), K. Steinert (Leipzig), A. Kraml (Letna), H. Deutsch, A. Bark, K. Brüser, P. Keßler, H. Zinngrebe, Ph. Strohmenger, P. Voigt, W. Schernikau, k.ino Voigt, M. Hurez (Frankfurt), F. Michalsky (Breslau), O. Samec, k.inoj M. Hourova, Manula Zelenkova (Pilsen), L. Istel (Wiesbaden), W. Schad, Ruppert Nicolaus (Worms), G. Spiegelberger, A. Doggilli (Trauenstein), R. Rech, O. Porth, O. Wabler, k.ino Else Bachmann (Frankfurt), Paul Philipp (Freital), F. Röhrig (Frankfurt), W. Vogel, K. Oehmisch (Leipzig), Larivière, R. Hairius, René Raguier, gek.doj Mettais, k.ino Glodeau (Paris), G. Schneider (Cannstadt), k.ino A. Dickmann (Nev-York), Nierenstein, Peteler, gek.doj Böttner (Frankfurt), Wendt (Düsseldorf), O. Falley (Halberstadt), G. Geyer, J. Günter (Frankfurt), G. Schwarz (Sterbfütz), J. Ros (Frankfurt), J. Kuirini, k.ino Deiters (Cassel), W. Wahl (Cöln), K. Fendler (Frankfurt), J. Treidel (Karlsruhe), k.ino R. Bloch (Frankfurt), K. Mathes (Mainz), I. Weinberger (Zürich), H. Geier (Beusheim), I. Tutram (Karlsruhe), k.ino Welk (Antwerpen), A. Landmann, A. Herklotz, O. Erbs (Leipzig), k.ino Limouzin (London).

*

Adresŝanĝoj

(En tiu rubriko ni publikigos la adresŝanĝojn de la membroj de S.A.T. Ni konsilas al ĉiu noti tiujn ŝanĝojn sur sian jarlibron)

paĝo 57: nova adreso de k.do Kurt Quell, Raimundstr. 11 III, Leipzig-Lindenau

paĝo 61: nova adreso de k.do Georg Schmitt, Küfer, Jungbuchsstraße 17 IV, Mannheim

paĝo 67: K.do Batta, Joz., ne plu loĝas en Prešov; nova adreso provizora: ĉe k.do Altermann, Otto, Bürgerstraße 65, Dresden-N. (Germ.)

paĝo 69: la adreson de l'membro 661 kompletigu jene: k.do Samohin, Petro, (telegrafisto) Telegrafo, Romny (Rusio)

paĝo 62: nova adreso de k.do Carbone Domenico, Via Mancini 15, Milano.

*

Eraroj en la Jarlibro

paĝo 62: Moskvo kuŝas en la 7a sektoro, ne en la 10a

paĝo 79: sama eraro en la "laŭsektora listo".

1 novembro 1922

La Sekretario de S.A.T.

S. A. T. anoj!

La plej trafà maniero propagandi esp.on estas montri per faktoj ĝian vivantecon: Traduku kaj represigu artikolojn el S. R. en nacilingvaj gazetojn.

Nepre sendu al la Redaktejo po du ekzempleroj el ĉiu koperna n^o.

LA VERKOJ DE FOURIER

EN FRANCA LINGVO, DUONLEDE
BINDITAJ, PARTE UNUA ELDONO,
ESTAS VENDEBLAJ. INFORMOJN
ONI PETU DE L'ELDONEJO

UNS-PRODUKTIVGENOSSENSCHAFT
LEIPZIG, ELISENSTRASSE 163



KORESPONDADO

TARIFO: Unu enpreso, 0.75 fr. — Tri enpresoj, 2 fr.
Por kurzsuferantaj landoj 1/3 da aktuala horsalajro.

MALLONGIGOJ: L = letero. PK = poŝtkarto. PI = poŝtkartoj ilustritaj. PM = poŝtmarkoj. bfl = poŝtmarko sur bildflanko. k.ĉ.l. = kun ĉiuj landoj. Esp-aĵo = Esperantaĵo.

Ĉiuj petantoj pri korespondado havas la devon nepre respondi almenaŭ unu fojon al ĉiuj petoj koncernantaj la fakon, por kiu ili sin enskribigis.

Aŭstrio

Kdo Josef Eder, Jakominpl. 14 e. t. 3, Stirio Graz. Koresp. nur pri anarkiismo. Vidu la kronikon de Aŭstrio.

Belgio

Kdo Léon Bergiers, 11 rue Lauwers, La Hulpe (provinco de Brabant) petas insiste la k.dojn el ĉ. l. skribi al li pri statistikoj pri salajroj kaj vivkosto (en 1914 kaj nun). La informoj servos por la 2a Jarlibro.

Bulgario

Kdo Pierre Atanosof, Instruisto, Kalugerodo Parargisvo. Kun gesam. L, PK, PI, ĉ. l.

Kdo Konstantin G. Kostov, Telegrafisto, Sevlievo. PM, PI, L kaj mono.

Ĉeĥoslovakio

Kdo Antoni Rendl, (21 jara), Plzen-Letna, vilao "Kukačka", prez. de L.A.E. Pri social. lab. movado, pri naturaj belecoj k. ĉ. l. fraŭlinoj.

Kdo Rudolff Tentura, vilao "Kukačka", Plzen-Letna. Pri naturaj belecoj k. ĉ. l.

Kdo Francisko Tomásek, Riegerstrato 187, Plzen-Letna. k. ĉ. l.

Kdo Alois Dolejší, Havličekstr. 129, Plzen-Letna. PM, PK, k. ĉ. l.

Kdo Táchav Trba, Jungmanstr. 264, Plzen-Letna. PM, PK, k. ĉ. l.

Kdo Eduard Stupka, Jungmanstr. 130, Plzen-Letna. PM, PK, k. ĉ. l.

Kdo Jaroslav Brejcha, Jungmanstr. 106, Plzen-Letna. PM, PK, k. ĉ. l.

Kdo Francisko Kalmy, n^o 11, Plzen-Lobzy. PM, PK, k. ĉ. l.

Kdo Tilhem Prexl, n^o 13, Plzen-Lobzy. PM, PK, k. ĉ. l.

Kdo Adalbert Martinek, Ejovice n^o 55 apud Plzen. PM, PK, k. ĉ. l.

Kdo Taclav Liska, Bukoveč n^o 56, apud Plzen. PM, PK, k. ĉ. l.

Kdo Taclav Fišer, Nyrany n^o 320, apud Plzen. PM, PK, k. ĉ. l.

Kdo Francisko Jukl, Červené Poričí n^o 34, apud Švihov. Pri nat. belecoj, interŝ. PK, L, k. ĉ. l., ĉiam respondas.

Kdo Antonio Zaneta, Nyrany n^o 127, apud Plzen. Kun edukistoj de poŝtkolomboj, interŝ. PM kun gesamid. (precipe Paris, Francio), ĉiam resp.

K^{do} *Mikael Meiner*, Burĝa bierfabriko, *Plzen*. Pri naturaj belecoj kaj vivrilatoj, k. ĉ. l.

K^{do} *Josef Nosek*, biera maltfaristo en *Mirošov*, n^o 64, apud *Rokycany*. Pri natur. belecoj kaj turismo k. ĉ. l. fraŭlinoj.

K^{do} *Taĉlav Todicka*, Mestansky pivovar, *Plzen*. Pri naturaj belecoj k. ĉ. l. fraŭlinoj.

K^{do} *Mikael Mathäuser, Irhanov* n^o 62, apud *Domazlice*. Pri naturaj belecoj k. ĉ. l. fraŭlinoj.

K^{do} *Jan Petera, Obora* n^o 38 apud *Ostromer*. Pri naturaj belecoj k. ĉ. l. fraŭlinoj.

K^{do} *Josef Sluka, Schiesglock*, poŝto *Postcherad*, apud *Postoloprť*. Pri naturaj belecoj k. ĉ. l. fraŭlinoj.

K^{do} *Francisko Stalder, Svarko* n^o 18 p. *Letiny* apud *Blovice*. Pri naturaj belecoj k. ĉ. l. fraŭlinoj.

K^{do} *Jakob Sejkot, Zalezky*, poŝto *Malenice*, apud *Tolyne*. Pri naturaj belecoj k. ĉ. l.

K^{do} *Taĉlav Rainer, Drahlin*, poŝto *Obcenice*, apud *Prilam*. Pri naturaj belecoj k. ĉ. l.

K^{do} *Jarko Tondraček*, (19jara), *Cervene-Pecky*, apud *Kolin*, deziras koresp. pri arto, muziko, k. ĉ. l. fraŭlinoj.

K^{do} *Antono Vlasák*, Provozec 11, poŝto *Blizejov* apud *Plzen*. PI, PM, L, k. ĉ. l. ĉiam resp.

K^{do} *Vojta Hes, Plzen*, t^r. ĉes. legii 16, i. PI, k. ĉ. l.

Fino *Anja Samahejlová*, *Chotiměř* 40, poŝto *Blizejov* apud *Plzen*. PI, PM, k. ĉ. l. gesam.

K^{do} *Jaroslav Pieek*, *Rubešova* ul 6, *Plzen-Petrohrad*. PM, k. ĉ. l., certe respondos!

K^{do} *Francisko Pešička*, *Husova* t^r 118, *Plzen-Doubrovka* pri natur. belec. kaj turismo. k. ĉ. l.

K^{do} *Josef Kold*, *Ujezd* 46 apud *Plzen*. PI, k. ĉ. l. fraŭlinoj.

K^{do} *Vaĉlav Drozda*, *Ujezd* 46 apud *Plzen*. PI, k. ĉ. l. ĉiam resp.

K^{do} *Vaĉlav Prokop*, *Ujezd* 89 apud *Plzen* pri teatro kaj arto k. ĉ. l. fraŭlinoj, ĉiam resp.

Fino *Manja Šefnerová*, *Bukovec* 61 apud *Plzen* pri muz., kanto kaj arto k. ĉ. l. fraŭloj.

Fino *Tanja Ĉizková*, *Ujezd* 103 apud *Plzen* pri teatro kaj natur. belecoj. k. ĉ. l.

Fino *Heluš Lukešova*, Instruistino, *Libušin* 188 apud *Praha*, *Harymírova* ul. PI, PM, pri taskoj de instruist., en esp. o-mov., k. ĉ. l. ĉiam resp.

K^{do} *Josef Schischka*, Inĝeniero, *Plzen*, *Krejčíko* ul. 9, ĉe *A. Zánela*, PI, PM, pri sia metio k. ĉ. l.

K^{do} *Alfredo Zánela*, *Nijřany* 111 apud *Plzen* (Kolorigisto), k. ĉ. l. pri ĉiu temoj.

Francio

K^{do} *Godard*, 9 Rue Mathieu, *St. Ouen* (Seine). PI, bfl, k. ĉ. l.

K^{do} *Bonnard*, 16 Boul. Gallieni, *Aulnay-s. Bois* (S. et O.). PI, L, k. ĉ. l.

K^{do} *Maurice Travaillé*, 1 Rue Planche aux Carpes, *Chartres* (Eure et Loir).

K^{do} *Gaston Saillant*, 6 Rue du Bourg, *Chartres* (Eure et Loir). PI, k. ĉ. l.

K^{do} *Lucien Merigot*, 12 Rue Porte Guillaume, *Chartres* (Eure et Loir). PI.

K^{do} *A. Bruyelle*, 29 rue du Coq Français, *Les Lilas* (Seine). k. ĉ. l. Gek.doj pri kontraŭmilit., komun. movadoj, ktp.

Kino *Triniol*, (20jara), *St. Etienne de Chomeil* (Cantal), k. ĉ. l., lit. kaj arto.

K^{do} *Willet*, 182 Avenue du Maine, *Paris* 14^e. PK.

K^{do} *Paul Huchet*, 25 rue Titon, *Paris* 11^e ant., pri social. temoj kaj PM, k. ĉ. l.

K^{do} *Etienne Salvat* (fraŭlo), Avenue Maury, *Estagel* (Pyr. Or.). PK, k. ĉ. l.

K^{do} *Bruant Roger*, 37 Place Jean Jaurés, *Troyes* (Aube). Junul. esp. k. ĉ. l. PM, PI.

Germanio

K^{do} *Kurt Klingner*, Annaberger Str. 55, *Chemnitz*. L, PI, bfl, PM, k. ĉ. l., interŝ. propagandilojn.

K^{do} *Heinrich Vogt*, Peter-Paul-Str. 7, *Magdeburg*. PI, k. ĉ. l.

K^{do} *Gustav Exner*, Wasserkunststr. 30, *Magdeburg*. L, PI ŝanĝas gaz., k. ĉ. l.

K^{do} *Erich Gaing*, Nordstr. 10, *Magdeburg*. PI, bfl, k. ĉ. l.

K^{do} *Arno Rothe*, *Lugau i. S.* L, PI, k. ĉ. l. pri pol. k. soc. vivadoj. Ĉiam kaj tuj respondos.

Kino *M. Schimmelpfennig*, Breite Str. 4, *Berlin-Schmargendorf*, ĉe *Manske*. PI, L, k. ĉ. l.

K^{do} *Georg Hager*, Petersgasse, *Schweinfurt*. L, PI.

K^{do} *Kurt Gehre* (18jara), Schulstr. 7, *Königszelt i. Schles.* k. ĉ. l. gejunuloj L, PK, PI.

K^{do} *W. Knoll*, Wendenstr. 10 I, *Erfurt*. k. ĉ. l. (precipe rusoj) L, PI pri div. temoj.

K^{do} *Haskiel Hochhäuser*, Neue Antonienstr. 4, ĉe *Seidel Breslau*. PI, k. ĉ. l.

Hungario

K^{do} *Izsó, L.*, Tipografisto, *Hondved-utca* 10, *Budapest V.* k. ĉ. l.

Polio

K^{do} *Aleksander Tajtelbaum*, stud. elektr., 42 *Nowogrodzka, Warszawa* pri lab. mov. kom., soc., L, PK, interŝ., PI, bfl.

Rusio

K^{do} *Aleksandr Kockin* (15jara), *Revolucionaja* str. 4, *Urĵum*, gub. *Viatka*, pri revol. kom. movado kaj disvastigo de *Esp.* ĉe la labor. junularo.

Sekcio Esperanto ĉe partia liga Klubo, *Urĵum*, gub. *Viatka*, kun prolet. organ. k. ĉ. l.

Lasthore

La

3^a Kongreso de S. A. T. okazos en Cassel (Germanio)

Adreso de la Kongreskomitato:

K^{do} *Frederik Deiters*, *Schillerstraße* 29, *K., Cassel*

Detala komunikajo aperos en la *Januara* numero.

Franclingvanoj atentu!

Jus aperis propaganda broŝuro plifaciligonta la disvastigon de la internacia lingvo en francaj revoluciemaj medioj.

En franca lingvo verkita, 36 paĝa, la broŝuro estas bele prezenta — Kun bildoj sur la Kovrilo.

Ĝi kostas 25 centimojn (afranke 40 centimojn).

Mendu ĝin al:

**Fédération espérantiste révolutionnaire
Bourse du Travail de Troyes-Aube**

Rabato estas konsentita al ĉiu grupo mendanta pogranda la broŝuron.

**Ĉiam legu tre atente la rubrikon:
OFICIALA INFORMILO**

Ĉiu esperantisto nepre devas havi en sia Biblioteko la unuan volumon de la S. A. T.-literaturo:

Tri Verkoj de Tolstoj

*El rusa lingvo tradukis J. M.
(Korektita kaj aprobata de Literatura Esperantista Asocio)*

*Kun portreto de la aŭtoro
kaj antaŭparolo de ROMAIN ROLLAND*

82 paĝoj.

PREZO AFRANKE: 1,50 franca franko por landoj kurzsuf'erantaj rilate al franca franko. Por anoj de S. A. T. nur 1,10 fr. fr.

3 francaj frankoj por Francio kaj ceteraj landoj — Por anoj de S. A. T. 2,25 fr. fr.

(Pagebla prefere per monbiletoj aŭ bankĉekoj.)
Havebla ĉe S. A. T., 23, rue Boyer, PARIS (XX^e)

Opinio pri la libro:

"Ni volonte konfesos, ke grava atentinda filozofa verko aperis en esp.o, ke ĝi estas bone tradukita kaj inde presita. Tio estas kompenso por multaj broŝuretoj aŭ infanaĵoj ne tre valoraj, kiuj svarmas en nia literaturo".

(El „Esperanto“ organo de U. E. A. n^o 258)

For la neŭtralismon de Sennaciulo

Necesega broŝuro por propagandi la celon de S. A. T.

Prezo aŭfranke: 0,50 fr. fr. por Francio kaj landoj kun monkurzo egala aŭ supera al franca franko.
2,00 mk. G. por germanio kaj ceteraj kurzsuf'erantaj landoj.

(la germanianoj mendu kaj pagu senpere al nia agento en Leipzig — K^{do} F. C. RICHTER, Sommerfelderstr. 44 — Leipziga poŝtĉeko 45170 :: la aliaj al ni mem en Paris).

Opinio de la recenzisto de „Esperanto“, oficiala organo de U.E.A., en la n^o 263—264, pri tiu broŝuro:

„... Esperantistoj ĝenerale pledas por neŭtraleco de sia movado. Sennaciulo deziras ekstermi la burĝecajn miasmojn, kiuj putrigas ĝin. Kontraŭkapitalistoj ne povas kunlabori kun aliopiniaj esperantistoj... Ne ĉiu akceptos la tezojn, sed ĉiu laŭdos la klarecon, precizecon kaj korektecon de l' stilo...“

G. S.

Fotografajo de la S. A. T.-Kongreso:

havebla ĉe

Leo Kempinski, Kronprinzenstrasse 17, Frankfurt a. M.
Formato 22×16 cm sur kartono, prezo aŭfranke: 40 mk. por Germanio, 50 mk. por ekster. Germanio; formato poŝtkarta: 4,50 kaj 5 mk.

KAMARADOJ

Societoj, Organizaĵoj, kiuj ŝatas bonegan, plej efikan presadon donas siajn komisionojn prefere al la laborista presejo

UNS-PRODUKTIVGENOSSENSCHAFT, E. G. M. B. H.

Elisenstrasse 163, Leipzig-Connewitz (Germanio)

Praktike aranĝitaj specialfakoj por fremdaj lingvoj ie precipa konsidero de l' Esp.-movado ebligas al ni senkritikeblan produktadon de: Libroj, gazetoj, katalogoj, jar- kaj komercraportoj, diplomoj, afiŝoj flugfolioj k. t. p. eĉ plej grandkvante, unu- kaj plikolore. Malgraŭ plej kontentiga plenumo niaj prezoj estas modestaj.